

juna amiko

novembro 2016 • n-ro 4/2016 (149) ←



La fabeloj de Anna Striganova
Konversaciaj temoj: vestaĵoj
AMO-seminario en Hungario
Sep kursoj dum BET en Litovio
Interkulturo: Indas viziti Italion!

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ



Neniu amas min, ĉar mi estas trouzita kaj rompita libro.

La uzitaj libroj povas esti tre interesaj! Pri via stato ne zorgu...venu kun mi

Nun ĝi estas riparita, kiu povas diri ke antaŭ tri tagoj neniu volis legi ĝin.

Vi pravas, Lisenjo. Gravas, ke la libroj instruas al ni ion bonan, kaj ni devas protekti ilin.

Aŭtoro: Miguel Ángel Díaz
Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco

Enhavo

Bildstrio Koboldeto (Miguel Ángel Díaz, CU) 2

Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4

Konversaciaj temoj: Zorgoj pri vestaĵoj (Judit Felszeghy, HU)..... 5

LUME: El mia kolora vivo: (Pavel Rak, CZ) 9

Nia sano: Vakcinado: neegoista protekto (Renée Triolle, FR).....10

Seminario: Raporto pri AMO-17 en Hungario (Márk Csőke, RS) 11

Poezio: Nazim Hikmet, turka poeto (Mireille Grosjean, CH) 12

LUDE, la unika dua etaĝo: Inter faro kaj rakonto staras meze granda monto (Mónika Molnár, CH) 13

Libroj: Kafka ĉe la marbordo (Mireille Grosjean, CH) 16

Legu kaj ĝuu (Małgosia Komarnicka, PL)18

Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj (Małgosia Komarnicka, PL) 20

EKSTERE: Arbaro de Zamenhof (Raita Pyhälä, FR).....21

Lernado de Esperanto: Sep Esperanto-kursoj dum BET-52 en Litovio (Halina Gorecka, RU)..... 22

Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) 25



Interkultura Mondo: Indas viziti Italion! (Elena Nadikova, RU)26

Kristnaska rakonto (Mireille Grosjean, CH) 29

Fabelo: Anĝela el pufmaizo (Luiza Carol, IL) 30

Recenzoj: Legendo pri la natura pejzaĝo; Eleganta libro pri bonkora fiŝisto (Luiza Carol, IL) 33

Enigma pri Japanio (Hori Jasuo, JP); Vivo estas (Patrino Tereza)35

LASTE: Nepalo kaj krucenigma (Stefan MacGill, HU/NZ). 37

Landaj Perantoj 38

Frontpaĝe: Anna Striganova (legu sur la p. 22)

Dorspaĝe: Esperanto en muzikfestivalo (Halina Komar, Andrzej Sochacki)

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://www.edukado.net) kaj [edukado.net](http://www.edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Doi Ĉieko (Japanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ĉiuj el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprich, ILEI.Oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 38. La sekva numero aperos en februaro 2017. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** €18 en tiel nomataj A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Finiĝas la jaro 2016. Antaŭ ni estas belegaj kristnaskaj kaj jarŝanĝaj festotagoj, kun ferioj aŭ libertempoj. Jarfino estas ankaŭ momento por retrorigardi, bilanci kaj konstati, kion ni faris bone kaj kion eble ne tute. Mi, via scivolema redaktoro, bonvenigus viajn reagojn ĉi-koncerne!



Zamenhof, legendo pri natura pejzaĝo), pri instruado de Esperanto en Litovio kaj Pollando, pri seminario en Hungario.

La Ulidoj en la rubriko LUDE instruos al ni kiel vidi nian mondon belega kaj admirinda. *La sorĉa kanto-mondo* vin eble kantigos pri Bona Espero. Eblas sperti atmosferon en grandioza muzikfestivalo en Pollando, kie sonis ankaŭ Esperanto. Kun la rubriko Interkultura Mondo ni vizitos Italion kaj Luiza Carol

rakontos al ni plian ĉarman fabelon. En la numero distros vin la tradicia bildstrio, kolorigendaj bildoj de la rubriko *LUME*, fabeloj, enigmo el Japanio, krucenigmo pri Nepalo... – Agrablan legadon, karaj amikoj!
Via redaktoro **Stano Marček**

Tiu ĉi numero plurloke okupiĝas pri festoj kaj vestoj (Konversaciaj temoj, El mia kolora vivo...), pri nia sano (vakcinado), pri literaturo kaj poezio (turka poeto Nazim Hikmet, japana verko *Kafka ĉe marbordo*, la rubriko *Legu kaj ĝuu...*), pri la naturo kaj arbaroj (Arbaro de

Karaj legantoj!

Por la jarfinaj festoj kaj por kristanoj okaze de la kristnaska festo oni elektas siajn plej belajn vestaĵojn. Familianoj kunvenas kaj kelkaj membroj de la familio provas prepari bongustajn manĝojn. Jen festa etoso.

Jen nova numero de via revuo *Juna Amiko* kun plej diversaj tekstoj kaj bildoj. Pluraj el ili prezentas vestojn aŭ aludas al vestaĵoj. Ĉu vi jam provis japanstilajn ŝtrumpetojn, kie ĉiu piedfingro havas sian “ujon”? Mi jes! Estas tre stranga sento, nekutima por mi, por miaj piedoj. Ĉu ili estas pli varmaj ol la kutimaj, mi ne povas diri. Se mi volas komuniki ion al vi, mi devas “vesti” miajn pensojn per vortoj en Esperanto, ĉar estas nia komuna lingvo. Se mi volas diri ion al personoj en mia vilaĝo, mi devas “vesti” miajn pensojn per vortoj en la franca, ĉar la franca estas la loka lingvo. Mi havas la impreson, ke miaj ideoj migras nude en mia kapo, en mia menso, kiel papilio en japanstila lampo, kaj ke ili bezonas vestaĵon por flugi al la persono,



kiun mi alparolas. En la rakonto de Murakami Haruki la maljuna viro parolas kate. Mi ankaŭ ŝatus paroli kate, tamen mi ne sukcesas. Kiam mi restadis ĉe gesinjoroj Doi en Yokohama, Japanio (sur la bildo), mi venis al supozo, ke ilia kato komprenas la japanan lingvon pli bone ol mi... Ĉu la kata lingvo estas la sama en la tuta mondo? Ĉu katoj jam havas ian Esperanton inter si? Kiu scias? Ĉe mi katoj diras “miaŭ miaŭ!”. Kaj ĉe vi?

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Zorgoj pri vestaĵoj

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. Agrabla surprizo zorgojn kaŭzas

La edzo Oskaro (O) babilas kun sia edzino Eleonora (E) hejme, en iu postlabora posttagmezo.

O – Saluton mia kara Elinjo! Mi havas grandan novaĵon por vi!

E – Saluton karulo! Rakontu, mi ege scivolemas!

O – Jen, rigardu la invitilon! Nia entrepreno okazigas dutagan kunvenon kun bankedo, amuziĝoj kaj ripozo, honore al la plej bonaj kunlaborantoj, inter kiuj ankaŭ mi estas.

E – Ho, tio estas ja vere granda honoro! Kaj diru plu, kie tio okazos kaj kiam?

O – Jam fine de la sekva monato, dum la lasta semajnfino. La kvarstela hotelo, kie la evento estas organizota, troviĝas apud la Granda Lago. La unuan tagon ni promenos en la proksima Belurbo, kaj vespere okazos la akceptado, kaj post la festena vespermanĝo, balo.

E – Ho, kiel mirinde!

O – Por la dua tago oni organizas perŝipan krosadon sur la lago, ekde mateno,

kaj posttagmeze eblas baniĝi, sunumi, sportumi, apud la lago, ĝis la forveturo.

E – Tio estas bonega programo, karulo! Vi devas esti tre eleganta dum la festa vespero!

O – Jes ja! Ankaŭ ĉar oni laŭnome, unuope alvokos la premiotojn, kaj gratulos ilin persone.

E – Ne forgesu provi vian festan jakon kaj la pantalonon!

O – Ho, mi ne survestis ilin jam... ekde nia geedziĝo! Ĉu ili estas ankoraŭ taŭgaj?



II. Kiel la tempo pasas, tiel la zorgoj kreskas

La edzo Oskaro (O) babilas kun sia edzino Eleonora (E) hejme, en iu postlabora posttagmezo, post unu monato.

- O – Mia kara, leviĝis en mia kapo, ke mi provu miajn malnovajn festajn jakon kaj pantalonon, ĉu ili estas ankoraŭ surporteblaj. Sed kion vi faras? Kial vi disjetis viajn vestojn?
- E – Neniu el tiuj estas jam bona por mi!
- O – Nekredeble! Tiu ĉi bruna jaketo kun la samkolora jupo estas tre simpatia! Mi rememoras, kiam siatempe ni renkontiĝis, vi ofte surhavis ilin! Vi aspektis en ili tre eleganta!
- E – Rigardu, kiel tiu jaketo nun aspektas! Ĉe la brusto mi jam ne povas butonumi ĝin! Kaj la jupo tute ne fermiĝas ĉe la talio.
- O – Hm... Kaj ĉu tiu bela blua robo kun blankaj puntetoj kaj floretoj? Mi tre ŝatis vin en ĝi!
- E – Ho! Tian oni jam ne portas! Mi ne volas, ke mi estu priridita malantaŭ la dorso!
- O – Strange... Kaj tiu ĉi griza jupo? Kaj la vinruĝa pulovro? Kiun difekton ili havas? Kia bonega teksaĵo!
- E – Jes, ili estas el lano, kaj malgraŭ la klopodoj, tineoj truiĝis ilin. Rigardu, kiom ili difektis ambaŭ! Ne eblas fliki tiom multajn truojn!
- O – Jen bela sporta pantalonon el kvadrata ŝtofo. Certe vi povas ankoraŭ survesti ĝin.
- E – Ho ne! Ĝi estas jam eksmoda, la malsupraj partoj estas vastaj, kun tiuj refaldoj ĝi aspektas ridinda!
- O – Vi eble povus malvastigi tiujn partojn, tondi la refaldojn, ĉu?

- E – Mi ne emas, mi ne povas kudri, kaj kudristino troveblas ege malofte.
- O – Kaj tiu bela malhelruĝa longa robo, kun blanka punto ĉirkaŭ la dekoltaĵo, kion pri ĝi? Ĉu ĝi estas el silko? Ĉu vi volas forjeti ankaŭ ĝin?
- E – Eble ne, sed mi certe ne kunportos ĝin al la hotelo! La robo estas el tafto, se mi sidiĝas, la jupa parto tuj ĉifoniĝas, kaj mi devas denove gladi ĝin.
- O – Hm... Do, mi ne enmiksiĝu en viajn aferojn pri vestaĵoj! Ĉu vi scias, kie estas mia malnova festa kompleto?
- E – Jen ĝi, Oskaro. Ĝi aspektas jam iom mizere.
- O – Bedaŭrinde, vi pravas. La veŝton mi jam ne povas surmeti, ankaŭ la jakon estas tro malvasta, mi ne povas spiri, se mi fermas ĝin! La pantalonon... ho, la zipon ne eblas fermi!
- E – Jes, vi ja dikiĝis sufiĉe lastatempe! Ni devos aĉeti novan! Morgaŭ posttagmeze ni iros butikumi!


III. Malfacila decido

La edzo Oskaro (O), lia edzino, Eleonora (E) kaj vendisto (V) en granda vestaĵvendejo, la postan posttagmezon.

- V – Bonan tagon! Pri kio mi povus helpi vin, gesinjoroj?
- O – Por mi jakon kun pantalonon, mi petas.
- V – Pri kia speco vi pensas? Ĉu ili estu iom sportaj, aŭ pli seriozaj, eble festaj?
- O – Por festo, jes.
- E – Karulo, la vendisto helpos vin elekti, dum mi iom ĉirkaŭkuros la vendejon! Ni renkontos nin post duonhoro, eble iom pli, ĉe la enirejo. Sukcesojn!
- V – Sinjoro, bonvolu rigardi tiujn! Mi proponas al vi tiun ĉi modelon! La jakon iom plilongigita, tre eleganta, sveltiga fasono, la grafitogriza koloro estas diskreta kaj laŭmoda. Ĉu vi

- provos ilin? Jen la provbudo, malantaŭ vi, iom dekstre!
- O – Ŝajne tiu ĉi ne estas mia mezuro. La jakon bona, sed tro longaj la manikoj, la pantalonon tamen mallonga...
- V – Mi bedaŭras! Bonvolu provi tiun ĉi, klasika vesto, el malhelblua drapo kun helaj strioj, la mola substofa igas la jakon eĉ pli komforta. Mi estas certa, ke tiu ĉi taŭgas por la sinjoro!
- O – Jes, ĝi estas sufiĉe bona, ĝi plaĉas al mi. Kiom ĝi kostas?
- V – Tiu kompleto estas el tre altkvalita drapo, tre zorgeme preparita, tiel ankaŭ la prezo ne povas esti tro malalta, ĉu ne... do, la jakon, la veŝton kaj la pantalonon kune estas entute nur 499 eŭroj.
- O – ... Momente por mi... hm... Ĉu vi bonvolas montri al mi iun alian?
- V – Sinjoro, rigardu tiun ĉi! Tiu modelo

- estas laŭ la plej lasta modo, vera unikaĵo, vi certe ne trovos iun, kontraŭvenante surstrate, en la sama vesto. La jakon kaj la pantalonon donas tre junecan aspekton, kaj la prezo estas nekutime favora! Bonvolu provi ilin!
- V – La jakon kaj la pantalonon ege bone sidas sur vi, sinjoro! Kvazaŭ ili estus preparitaj speciale por vi!
- O – Iu problemeto tamen estas... Rigardu la poŝon de la jakon! La kudraĵo ŝiriĝis, kaj la poŝon jam apenaŭ tenas fadeno! Kaj...
- V – Ho, kia misaĵo! Do, la knabinoj tre rapide kudros ĝin en la surloka metiejo!
- O – Kaj ...
- V – Donu la jakon, sinjoro, mi petas! Tuj ĝi estos perfekta!



- O – ... ankaŭ la pantalonoj! Jen, granda nigra, glueca makulo!
- V – Nekredeble! Tio ne povas okazi!... Bonvolu rigardi tamen...
- O – Mi deziras rigardi nenion plian. Ĝis revido!
-
- O – Kiom da pakajoj vi havas, karulino!
- E – Ha, jes... Mi trovis kelkajn tre bonajn ofertojn, mi ne volas aĉe aspekti apud vi dum la bankedo! Kaj kion pri viaj jako kaj pantalonoj?
- O – Eble mi povas maldikiĝi per seriozega fasto tiom, por ke la malnova kompleto estu taŭga por mi.

Taskoj

- I.
 - Unue legu la tekston atente, kontrolu, kiom vi komprenas.
 - Kolektu la nekonatajn vortojn, konsultu vian vortaron, kaj vi povas dividi la vortojn (inkluzive la jam konatajn) en diversajn grupojn.
- Ekzemple: Vortoj pri vestomaterialoj: teksaĵo, lano, ŝtofo, punto, tafto, silko, drapo, lano...
- Pliaj grupetoj povas esti: vestoj kaj vestaĵoj (jako, jupo...), ŝtofo-ornamoj (puntoj, floroj...), vestopartoj (kolumo, maniko, butono...), difektoj de vestaĵoj (truo, makulo...), preparo, riparo de vestaĵoj (faldi, tondi...), pri la ekuzo, uzo de la vestaĵoj (surmeti, butonumi).
- Aldonu pliajn vortojn al la unuopaj grupoj, kiujn vi jam konis, kaj trovas en la vortaro!
- Faru konkurseton kun viaj samgrupoj, partneroj, kiuj havas la plej multajn taŭgajn vortojn en la unuopaj grupetoj!
- Demandu viajn partnerojn, ĉu ili konas la signifon de viaj vortoj! Se via grupeto estas internacia, anstataŭ la traduko klarigu alivorte kion signifas la vortoj, aŭ diru frazojn kun ili!

- II.
 - Rakontu kio okazas en la tri dialogoj, sen rigardi la tekston!
 - Disdonu la rolojn, kaj faru dialogojn laŭ la supraj!
 - Ŝanĝu la 1-an dialogon tiel, ke la celo de la veturado estos vintra montaro!
 - Ŝanĝu la 2-an dialogon tiel, ke vi aldonas plian vestaĵon, kiu ial ne plu plaĉas al vi!
 - Ŝanĝu la 3-an dialogon tiel, ke la vendisto proponos iun plian vestaĵon – ĝi povas esti virina vestaĵo!
 - Ĉu vi ŝatas vesti vin? Ĉu vi klopodas vesti vin laŭmode? Starigu (3 – 7 minutan) dialogon kun via(j) partnero(j) pri nuntempaj vestaĵoj kaj modo!

- III.
 - Skribu aŭ buŝe prezentu, kiujn kaj kiajn vestaĵojn surhavas a) vi; b) via parolpartnero!
 - Provu rememori kiujn vestaĵojn vi uzas kutime vintre, printempe, somere kaj aŭtune!
 - Skribu leteron al via esperantista amik(in)o, en kiu vi rakontos, ke vi partoprenis modprezentadon, kiajn modelojn vi vidis tie, kiu plaĉis al vi, kaj sekve vi decidis kudri(gi) por vi novan kompleton (robon, jakon... ktp), kion vi devis aĉeti por tio, kaj kiel komencis vi (aŭ la tajloro, la kudristino) la laboron. Via letero povas esti inter 15 – 20 linioj.
 - Verku raporton (ekzemple por retpaĝo aŭ por radioelsendaĵo) pri modprezentado, en kiu vi informas la legantojn (aŭskultantojn), a) kial, kiucele vi vizitis la modprezentadon, b) kiel aspektis la ejo, kia estis la publiko, c) kiujn, kiajn vestaĵojn prezentis la manekenoj – donu ĝeneralan bildon, kaj pli detalan pri unu aŭ du, ankaŭ pri la manekeno! ĉ) Kiel plaĉis persone al vi la evento, ĉu vi trovas ĝin interesa, utila, kial. La raporto povas esti 20 – 35 liniojn longa.

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegnto: Pavel Rak



Kolorigu: 1-ruĝa, 2-helblua, 3-helverda, 4-helbruna, 5-flava, 6-rozkolora, 7-bruna, 8-verda, 9-blua, 10-griza, 11-viola, 12-helgriza. Verku rakontojn pri tio, kio okazas sur la bildoj. Skribu liston de la vestaĵoj kaj objektoj, kun iliaj koloroj!

Renée Triolle

Vakcinado: neegoista protekto



Vi certe memoras kuraciston en blanka kitelo, kiu alproksimiĝas por piki vin per injektilo. Aŭ vi memoras, ke via pli juna frato aŭ fratino ekploris tuj.

Tamen vi estas bonŝancaj, ke en via lando oni protektas la infanojn kontraŭ teruraj malsanoj, kiuj transdoniĝas de homo al homo, simple ĉar oni vivas apud malsanulo, kiu tusas (ekz. tuberkulozo), aŭ oni tuŝis la samajn aĵojn (ekz. hepatito aŭ morbilo), aŭ la mikrobo troviĝas en la akvo, kiun oni trinkis (difterio, poliomjelito), aŭ en infektita tero (ekz. tetanoso).

Kiel funkcias vakcinoj?

1. Oni prilaboris en laboratorio erojn de mikrobo (viruso aŭ bakterio). La vakcino enigas ĝin en vian korpon tiel, ke ĝi protektos vian organismon, se poste vi renkontiĝos kun la sama mikrobo. Plej ofte la vakcino eniras per injektilo, iam oni englutas guton de ĝi (ekz. kontraŭ poliomjelito, sur peco da sukero).

2. Tiuj eroj de mikrobo ne estas bonvenaj en la organismo, kiu protestas kaj defendas sin. Ĝi produktas defendilojn, nomatajn antiksenoj aŭ antikorpoj.

3. La korpo konservas en memoro tiun renkontiĝon kaj estas jam preta, se hazarde ĝi renkontiĝos kun la sama mikrobo.

Oni diras, ke ĝi estas imuna, tio estas ŝirmita kontraŭ la malsano.

Al kio utilas vakcino?

En evoluitaj landoj, kie de dekoj da jaroj beboj kaj junaj infanoj ricevas devigan vakcinon kontraŭ ekz. difterio, tetanoso, poliomjelito, tuberkulozo aŭ meningito, tiuj infektaj malsanoj malaperis. Ekzemple en Francio en 1923 mortis 45.000 homoj jare pro difterio, nun neniu; same pri poliomjelito: se 4000 homoj estis tuŝitaj kaj mortis aŭ restis invalidoj en 1952, nun neniu plu. Bedaŭrinde en la mondo daŭre mortas ĉiujare 1,4 milionoj da infanoj, ĉar ili ne ricevis vakcinon: 38% pro morbilo, 27% pro gripo; 20% pro kokluŝo kaj 14% pro tetanoso. Se en 1998 poliomjelito estis endemia (ĝi ekzistis kaŝe!) en 125 landoj, en 2013 nur en 3 landoj. Do granda progreso. Sekve iuj gepatroj opinias, ke ne plu indas vakcinigi siajn gefilojn, ĉar statistike ili ne plu havos malbonŝancon esti trafitaj... Sed la malsanoj reaperas pro migrado de laboristoj, rifuĝintoj kaj turistoj.

Protekti sin por protekti la aliajn


Unu sola homo, infektita de morbilo, povas infekti 17 homojn; bebo kun mumpso (malsano de la oreloj) povas infekti 7 homojn (eĉ la patron aŭ avon, kaj tiam la mikrobo migras al la testikoj kaj iĝas pli danĝera); vintra gripo dividiĝas kun du homoj. Do se vakcino ekzistas, ni ne egoisme suferos vakcinadon por protekti ne nur nin mem, sed ankaŭ niajn kunulojn. Ne necesas ricevi vakcinon kontraŭ tropika malsano kiel flava febro, se vi ne planas vojaĝi al lando, kie ĝi estas! Ni povas imagi la ŝokon en 1885, kiam Louis Pasteur injektis prove vakcinon kontraŭ rabio al knabo, kiu estis mordita de hundo! Ĉar neniu sciis pri la efiko de vakcinado. Hodiaŭ esploristoj esploras vakcinojn kontraŭ diversaj malsanoj, sed bedaŭrinde post 40 jaroj ankoraŭ ne malkovris vakcinon kontraŭ AIDS. Ni profitu de la ekzistantaj kaj ne forgesu regule (ĉiujn dekan aŭ dudekan jarojn) refari vakcinadon, por stimuli denove nian organismon, kaj ni helpu asociojn disvastigi vakcinadon en malpli riĉaj landoj.

Márk Csóke

Raporto pri AMO-17 en Hungario

Mi havis la okazon partopreni AMO-seminaron (Seminario pri Aktivula Maturigo) dum JES (Junulara Esperanto-Semajno) en Hungario, Eger, kiel stipendiulo de Universala Esperanto-Asocio.

La Junularan Esperantan Semajnon patroprenas junuloj ĉefe el Eŭropo, sed ankaŭ el la aliaj partoj de la mondo. En kadroj de JES ĉi-foje oni organizis la seminarion AMO-17. La temo de la seminario estis “kiel junuligi esperantistan komunumon”. Mi aŭskultis interesajn prelegojn pri tiu temo. Tiuj prelegoj okazis antaŭtagmeze dum kvar tagoj, kaj ni aktive partoprenis en la diskutoj. Oni detale analizis la problemon, ke inter la aktivaj esperantistoj estas ĉiam pli kaj pli da maljunaj personoj, kaj malmulte da gejunuloj. Tiu problemo ekzistas en preskaŭ ĉiuj unuopaj landoj. Oni serĉis la kaŭzon por tiu fenomeno, kial Esperanto ne estas populara inter



gejunuloj. Ni detale diskutis pri la fortoj, lamaĵoj, avantaĝoj kaj minacoj de la situacio. Oni demonstris detalan planon por disvastigi Esperanton inter la gejunuloj kaj formuli strategiojn por altiri pli da junaj membroj al UEA kaj TEJO. Mi ĝis nun ne okupiĝis pri tiuj temoj, kaj ili estis novaj por mi. En Serbio Esperanto ne estas tre populara inter gejunuloj, ĉefe pro manko de informoj. Multaj gejunuloj eĉ ne scias pri la ekzisto de Esperanto, kaj tiuj malmultaj, kiuj parolas la lingvon, ne estas aktivaj en TEJO.

Mi volonte partoprenus ankaŭ en la laboro de TEJO. Mi ekkonis multajn interesajn gejunulojn, kaj apud seriozaj temoj ni multe ĝuis la posttagmezojn kaj vesperojn.

Mi tre dankas al sinjoro Stefan MacGill, kiu multe helpis kaj instigis min, kaj precipe mi dankas al Aranka László, kies entuziasmon mi multe admiras, kaj kiu subtenis min partopreni la AMO-seminaron kaj JES-on.





Mireille Grosjean

Nazim Hikmet, turka poeto

Nazim Hikmet (1902 – 1963). Verkisto li estis, librojn kaj poemojn li skribis, tamen li estis tre engaĝita persono kaj luktis je la flanko de homoj subpremataj, ekspluatataj, kaj batalantaj kontraŭ maljusteco.

Li jarojn sidis en malliberejo, malsatstrikis, sed povis liberiĝi. Li devis fuĝi al Ruslando, kie li konatiĝis kun la soveta varianto de komunismo. Tuj li kritikis maljustecon kaj cenzuro bremsis liajn verkojn. Li mortis tie kaj estis enterigita apud Ĉeĥov, Gogol, Majakovski kaj aliaj famaj rusaj verkistoj. Jen eta peco; bonvole gustumu:

Ĉu mi estu nuboj?

Multkolora nuboj super la maro,
Arĝenta ŝipo sur ĝia vizaĝo,
Flava fiŝoj ene,
En la fundo blua algo.
Nuda viro sur la bordo,
Haltinte, pensas.

Tradukis Vasil Kadifeli




Kvazaŭ japanstilaj versoj, mallongaj kaj esprimplenaj.

La belega poemo finiĝas tiel :

Ĉu mi estu nuboj,
Aŭ ĉu ŝipo?
Ĉu mi estu fiŝoj
Aŭ ĉu algo ?
Nek tio, nek tio, nek tio.
Oni devas esti maro, mia filo,
Kun ĝia nuboj, ĝia ŝipo,
ĝia fiŝoj kaj ĝia algo.

Inter faroj kaj rakonto staras meze granda monto



La rubrikon prizorgas Mónica Molnár

La historio pri “Mi kaj Vi” estis tiom bela, ke la Ulidoj eĉ dufoje finspektis ĝin. Ili kontentis havi multajn, bonajn amikojn kaj tre-tre kontentis esti denove hejme.

La granda vojaĝo ege lacigis multajn Ulidojn, do post la filmeto ili adiaŭis la gevojn kaj tuj iris dormi. Avo Maljunulo kaj Avino Maljunulino kontente ridetis kaj komencis iom reordigi la salonon post tiu bela festo.

– Ho, kiom mi ĝojas, ke ili estas denove kun ni, sanaj kaj gajaj. – diris Avino Maljunulino. – Mi pensas, ke ankaŭ vi ĝojas, Avo Maljunulo, ja normale vi grumblus, ke ili lasis nin sen proponi helpon por la ordigo, sed nun...

– Fakte, mi restis por helpi vin. Ĉu bone? – aŭdiĝis laca voĉeto de Helpemulido inter du oscendoj.

– Ho, – diris ridete Avo Maljunulo – iru rapide en la liton. Via helpo estos pli utila kaj cetere tre bonvena morgaŭ. Bonan nokton, mia kara Helpemulido.

Helpemulido ne insistis, ja li apenaŭ povis teni la okulojn malfermitaj, do ankaŭ li rapide malaperis malantaŭ la pordo.

La gevoj rearanĝis la salonon, lavis la telerojn, la manĝilaron kaj jam preskaŭ tute pretis, kiam ili ekaŭdis mallaŭtan kvereleton. La voĉoj venis de la koridoro:

– Ne, vi ne pravas, ĝi estis tute bone komprenebla! Aŭ ĉu eble vi ne komprenis ĝin?

– Jes, certe ke mi komprenis, sed povas esti, ke ne ĉiuj komprenis. Konfesu, ke mi pravas!

– Ne! Mi tute ne konsentas kun vi!

Estis Kverelemulido kaj Pravemulido, kiuj parol-batalis en la koridoro.

– Kio okazas? – demandis la avino. – Ĉu vi ne estas laca? Ĉu vi ne volas dormi? Kial vi bruas kaj krias? Kio estas la problemoj?

– Kverelemulido ne komprenis la filmon. Li diras, ke certe estas homoj, kiuj pensas, ke la frazoj, kiel “Mi sentis sin sola”, estas malĝustaj. Sed tio ne veras! La frazoj ja ĝustegas!

– Ne, ne! Estas Pravemulido, kiu komprenas nenion! Mi tre bone komprenis la filmon, mi scias, ke la ĉefrolantoj nomiĝas Mi kaj Vi, do la frazo “Mi sentis sin sola” estas tute ĝusta. Tamen, se iu rapide legas ĝin aŭ sen sufiĉe da atento, povus konsideri



ĝin malĝusta... Sed ne mi estas tiu persono! Tute ne!

- Infanoj, infanoj! – skuis la kapon la avo. – Ĉesu kvereli pri tiaj aferoj! Vi ambaŭ bone komprenis la filmon, sed vi malĝojigas unu la alian pro eventuala miskompreno de aliaj homoj. Ne faru tion! La mondo estas bela, sed nur por tiuj, kiuj kapablas vidi kaj aprezi ĝin tia. Mi eĉ pruvos tion al vi per la bela rakonto de 10-jara knabo, Jon Kanani el Svislando. Tiu rakonto kun siaj belaj bildoj helpas vin havi belajn sonĝojn, sed antaŭ tio, mi volas aŭdigi al vi alian historieton kaj mi scivolemas pri viaj opinioj. Jen ĝi:



Estis foje kvar homoj. Laŭnome: **Ĉiu**, **Iu**, **Iu Ajn** kaj **Neniu**. Iun belan tagon

oni diris al **Ĉiu**, ke ekestis grava laboro urĝe farenda. **Ĉiu** certis, ke **Iu** faros ĝin. **Iu Ajn** povintus fari ĝin, sed eĉ **Neniu** pensis tion. **Iu** ege koleriĝis, ĉar ĝi estintus la laboro de **Ĉiu**. **Ĉiu** pensis, ke **Iu Ajn** povus fari ĝin kaj eble **Neniu** rimarkis, ke **Ĉiu** evitas la laboron. Finfine **Iu** estis tiu, kiun **Ĉiu** kulpigis, ke **Neniu** pensis fari tion, kion **Iu Ajn** povintus fari.

- Jen la fino. Opinio?

La knaboj ekridis kaj kune respondis al la avo:

- **Iu** volis kvereli, **Ĉiu** estis preta aŭskulti **Iun Ajn**, sed bonŝance **Neniu** estis en la ĉambro. Ha-ha-ha! Ni komprenis la lecionon kaj antaŭdankas la rakonton de Jon!

		
<p>Jon Kanani: La mondo</p>	<p>La mondo estas bela kun siaj grandaj urboj kaj malgrandaj vilaĝoj.</p>	<p>Estas vere, ke estas en ĝi ankaŭ ne bonaj aferoj, kiel la fumo-nebulo, la forlasitaj rubaĵoj, ktp</p>

		
<p>Sed ni rigardu ĝiajn belajn flankojn, la kamparojn, la arbarojn, la tendumejojn...</p>	<p>Ekzistas ankaŭ pluraj, malgrandaj, belaj insuloj en nia bela mondo. Sur ili ofte estas belaj palmoj.</p>	<p>En la grandaj urboj aŭ en amuzparkoj oni povas trovi enorman radon, el kies seĝoj bone videblas nia bela mondo.</p>
		<p>La rakonteto finiĝis, la Ulidoj iris dormi, la geavoj finis la ordigon kaj antaŭ ol iri litten, ili eliris la domon kaj el la ĝardeno ili sonĝe rigardadis la belajn stelojn ankoraŭ longe-longe.</p>
<p>Ekzemple en Ameriko oni eĉ ne bezonas la radon, sufiĉas iri tute supren en la altaj turoj por povi vidi ĉion.</p>	<p>La mondo estas bunta kaj diversa kaj ĝuste pro tio ĝi estas tiom bela. Ĉu ne?</p>	



Murakami Haruki: Kafka ĉe la marbordo

Komenco de la sesa
ĉapitro de la japana
verko titolita *Umibe no
Kafuka*.

Tradukis el la franca versio
Mireille Grosjean. Reviziis
laŭ la originala teksto Doi
Ĉieko.

– Bonan tagon, diris la maljunulo. La kato apenaŭ levis la kapon kaj reagis al lia salutado, mallaŭte per laca tono. Temis pri maljuna dika virkato nigra.

– *Bela tago, ĉu ne... ?*

– *Hmm*, diris la kato.

– *Neniu nuboj!*

– *Nun ankoraŭ ne...*

– *Ĉu la bela vetero ne daŭros?*

– *Vespere la vetero malboniĝos, laŭ mia opinio*, respondis la nigra kato, etendante malrapide kruron kaj faldante la okulojn kun rigardo al la maljunulo. Li rigardis la katon kun rideto. Tiu lasta hezitis iomete, sen komprenebla kialo, kaj poste rezignis pri silento kaj ekparolis.

– *Hmm... do ĉu vere... vi kapablas paroli, vi ?*

– *Jes*, diris la maljuna viro kun iom da honto. Poste, por montri respekton, li forprenis sian ĉapelon por montgrimpanto, el eluzita kotono.

– *Mi ne alparolas ĉiujn katojn, kiujn mi renkontas*, li diris. – *Nur kiam la cirkonstancoj estas pozitivaj, mi povas iel alparoli kiel nun.*



– *Hmm... diris la kato, resumante per tiu sono siajn impresojn.*

– *Espereble tio ne ĝenas vin, se mi sidiĝos dum momenteto. Mi, Nakata, estas iomete laca pro paŝado.*

La nigra virkato stariĝis malrapide kun tremado en la lipharoj kaj tiel grande oscedis, ke ĝia malsupra makzelo preskaŭ demetiĝis.

– *Tio ne ĝenas min. Estus pli bone dirite, ke tio ne koncernas min. Vi povas sidiĝi ien ajn laŭ via plaĉo. Neniu plendos al vi.*

– *Koran dankon!* diris la viro sidiĝante apud la katon. – *Ĉar mi paŝadas de la sesa horo matene.*

– *Do nun mi komprenas... vi nomiĝas s-ro Nakata, ĉu ?*

– *Jes ja, jes ja. Kaj vi, s-ro Kato?*

– *Mi forgesis mian nomon*, diris la nigra kato. – *Ne pro la fakto, ke mi neniam havis nomon, sed en certa momento ĝi perdis sian utilecon kaj pro tio mi forgesis ĝin.*

– *Estas vero. Oni rapide forgesas tion, kion oni ne bezonas. Same estas ankaŭ por mi, Nataka*, diris la viro gratante sian kapon.

– *Nu do, ĉu vere vi ne havas mastron, s-ro Kato?*

– *Antaŭ longa tempo mi havis unu, sed nun ne plu. Ĉe kelkaj proksimaj domoj oni donas al mi manĝaĵojn, tamen mi ne apartenas precize al unu el ili.*

Nakata skuis la kapon, silentis dum momento kaj demandis :

– *S-ro Kato, ĉu mi rajtas nomi vin s-ro Ootsuka?*

– *Ootsuka?* ripetis la kato kun surprizita rigardo al la viro. – *Pri kio temas fakte? Kial mi estu Ootsuka?*

– *Oh... tio ne havas ian signifon. Tiu nomo ĵus venis al la menso de mi, Nakata. Sen nomo mi penas memori pri aĵoj, kaj pro tio mi donas simple tiun nomon al vi. Nomo, tio estas praktika afero. Ekzemple iu, ne tre lerta persono kiel Nakata, sukcesas memori,*

ke en posttagmezo je tiu horo mi renkontis la nigran katon, s-ron Ootsuka en lasita enurba tereno de la dua bloko de la distrikto X kaj diskutis kun li.

– *Hmmm. Mi ne komprenas tute bone. Katoj ne bezonas tion. Ni kontentiĝas pri odoroj, pri formoj, pri tio, kio ekzistas. Kun tio ni ne havas problemojn.*

– *Jes, mi, Nakata, bonege komprenas; sed s-ro Ootsuka, pri homoj, ni ne similas al vi. Ni bezonas datojn, nomojn, por memori pri multaj aferoj.*

La kato elspiris tra sia nazo.

– *Tio ne estas praktika afero.*

– *Jes, ja! Tio ne estas praktika afero, se iu devas memori multajn aferojn daŭre. Eĉ mi, Nakata, devas memori la nomon de la prefekto, la numerojn de la busoj... Ĉiumaniere, s-ro Kato, ĉu mi rajtas nomi vin s-ro Ootsuka? Aŭ eble tio ĝenas vin?*


– *Tio estas ne tre agrabla al mi, tutcerte. Tamen mi ankaŭ ne opinias tion malplaĉa. Egalas al mi. Faru laŭ via bontrovo. Kial ne Ootsuka? Mi nur havas la impreson, ke ne temas pri mi. Sed ne gravas...*

– *Ah ! Nakata estas tre kontenta. Multan dankon, s-ro Ootsuka.*

– *Tamen... vi parolas iom strange, kiel homo, diris Ootsuka.*

– *Jes, ĉiuj diras tion al mi. Sed Nataka ne kapablas paroli alimaniere. Mi provas paroli normale, kaj jen la rezulto. Tio okazas tiel, ĉar mi ne estas inteligenta. Mi ne ĉiam estis stulta, sed mi havis akcidenton, kiam mi estis infano kaj mi fariĝis stulta. Mi ne kapablas skribi, mi ne kapablas legi gazetojn, nek librojn.*

– *Mi ne volas fanfaroni, sed ankaŭ mi ne kapablas skribi*, diris la kato lekante plurfoje la kusenetojn de sia dekstra antaŭpiedo. *Tamen mi ne estas aparte idiota, kaj tio neniam ĝenis min.*



– *Tio estas normala en la kata mondo*, diris Nakata. – *Sed ĉe homaj animaloj, kiam iu ne kapablas skribi, tiu estas idioto. Kaj kiam iu ne kapablas legi librojn kaj gazetojn, tiu same estas idioto. Tiel estas decidite. La patro de Nakata forpasis jam longe antaŭe; li estis profesoro en universitato, tre talenta fakulo pri fi-nan-coj. Plie Nakata havas du pli junajn fratojn, kiuj ambaŭ same estas tre inteligentaj. Unu laboras en oficejo, li estas la fakestro. La alia laboras en la ministrejo pri ko-mer-co kaj in-dust-rio. Ambaŭ loĝas en grandaj domoj kaj manĝas angilojn. Nur mi, Nakata, estas la nura idioto en la familio.*

– *Tamen vi scipovas tiel paroli al katoj, ĉu?*

– *Jes*, diris s-ro Nakata.

– *Ne ĉiuj kapablas fari tion, ĉu ne?*

– *Vi pravas!*

– *Do vi ne povas aserti, ke vi estas idioto.*

– *Jes.. ne... vero estas, ke ... Nakata ne scias. Dum sia tuta infaneco Nakata aŭdis, ke li estas idioto, Nakata ne povas opinii ion alian pri si mem. Ĉar mi ne kapablas legi la nomojn de la stacidomoj, mi do ne povas aĉeti biletojn, ne povas veturi per trajnoj. Sed se mi montras mian karton de handikapito en la urbaj busoj, oni lasas min vojaĝi senpage.*

– *Hmm... diris s-ro Ootsuka sen montri ian emocion.*

– *Kiam oni scipovas nek skribi nek legi, oni ne povas trovi laboron.*

– *Kiel vi vivtenas vin do?*

– *Per mia pen-si-o.*

– *Pen-si-o ?*

– *La prefekto donas al mi monon. Mi loĝas en eta apartamento en konstruaĵo en Nogata. Mi manĝas trifoje tage.*

– *Tia vivo ŝajnas al mi en ordo.*

– *Vi pravas. Ne malbone. Mi estas protektita kontraŭ vento kaj pluvo. Nenio mankas al mi.*

Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.junaamiko@gmail.com



Bela donaco

Proksimiĝas fino de la jaro. Kiel kutime ni preparos kristnaskajn donacojn. Ni perdos multe da tempo vizitante vendejojn, serĉante ĝustajn donacojn.

Mi proponas, ke vi ĉi-jare aĉetu librojn por ĉiuj. Bone elektita libro estas bona investado. Ĝi precipe estas bona investado por infanoj. Donacante libron al infanoj ni instruas al ili estimon al la libro, sed ankaŭ ni kaŭzas, ke ĉi tiu libro fariĝas ilia belega memorajo el la infaneco.

Aĉetante librojn ni atentu pri ekzakta eldonaĵo, pri la aŭtoro, pri la papero kaj pri la ilustraĵoj. Dank' al tio ni lernas esti estetikuloj kaj utiligi bonajn kaj altvalorajn aĵojn. Aĉetante librojn ni ne rapidu, ni dediĉu iom da tempo por bone pripensi nian elekton. Ni ne timu peti helpon de la vendisto.

Ni aĉetu por infanoj ankaŭ librojn, kiuj tuŝas malfacilajn temojn. La infanoj devas ellerni, ke la mondo ne estas fabelo. Tio permesos al ili ricevi scion kaj prepari sin por malfacilaj vivmomentoj. Ni ne ofte parolas kun infanoj pri morto, milito, izoliteco, soleco ktp. Antaŭ ĉio ni serĉu altvalorajn librojn. Ni partoprenu en aranĝoj, kiuj estas organizataj en bibliotekoj, librovendejoj, renkontiĝoj kun aŭtoroj aŭ kun laŭta legado de la libroj.

Malgraŭ tio, ke en la nuna tempo libro ne estas sola fonto de informoj kaj ankaŭ amuziĝo, ni multe legu kaj ankaŭ pridonacu aliajn per libroj, ĉar legado aktivigas kvin gravajn kompetentecojn, pri kiuj mi skribos pli jam januare.

Ni do memoru, ke legado ne estas medikamento por ĉiuj malfacilaĵoj, sed ĝi eksterdube estas la plej bona ilo por eviti malfacilaĵojn, kaj krom tio legado estas ankaŭ bonega ludo.

Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco.




La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas belan libron *Kristnaska kanto* de Charles Dickens, kiu estas havebla en Esperanto. Martyn Westcott en 1905 tradukis la novelon al Esperanto sub la titolo *Kristnaska sonorado*. En 2000 aperis lingve redaktita eldono sub la titolo *Kristnaska kanto*.

Dum la Antaŭkristnaska Vespere, t.e. en la nokto de la 24-a de decembro, la heroon de la novelo Ebenezer Scrooge, riĉan avaran maljunulon, vizitas kvar fantomoj.

La unua fantomo estas Jacob Marley, kunfondinto de la firmao, "Scrooge kaj Marley", kiu transdonas gravan informon al Ebenezer Scrooge, dirante, ke la animo de Scrooge estas en danĝero. Se li ne ŝanĝos sian viv-manieron, li fariĝos fantomo kun longa ĉeno kaj suferos. Sekvaj tri fantomoj, reprezentantaj la Kristnaskon estintan, nuntempan kaj estontan, montras al la heroo lian pasintan, nuntempan kaj estontan vivojn.




Charles Dickens

Dank' al tio Ebenezer Scrooge komprenis, ke li senespere vivas, ke ne valoras esti malavara, ami nur monon, nenion fari por helpi al aliaj. Li devis akcepti, ke li vivas sencele kaj sencele. Li forgesis, ke en la vivo ekzistas ankaŭ amo kaj amikeco. Ebenezer Scrooge komprenis, ke veran feliĉon oni atingas nur tiam, kiam ni scipovas dividi kun aliaj. Li denove fariĝis malavara kaj bonkora homo, kiu li estis estante junulo.

Kristnaska kanto estis granda sukceso de Charles Dickens. Ĝis hodiaŭ oni neniam ĉesis eldonadi ĝin. Ĝi estis ankaŭ multfoje adoptata por televido, radio, filmo, opero, muzikalo, teatraĵo kaj ankaŭ en bildliteraturo.

De tiu tempo la vorto *scrooge* eniris la anglan lingvon kun signifo de avarulo aŭ homo, kiu malamas Kristnaskon.

La libro estas elŝutebla en pdf-formato ĉe <http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20dickens,%20charles%20-%20kristnaska%20kanto.pdf>.





Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj

Ĉi-numere mi proponas, ke vi mem priskribu elpensitan de vi landon kun legendoj. Ĉu vi scipovas fari tion? Ne estas facila tasko, sed provu. Valorajn premiojn fondis la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 31-a de novembro 2017 al la adreso de Centrum Edukacji Międzykulturowej – Wrocław, ulica (strato) Pl. Orłąt Lwowskich 5/1, PL 53-605 Wrocław, Pollando.

Kiel kristnaskan donacon de mi bonvolu tralegi belajn poemojn de Halina Kuropatnicka-Salamon, vroclava poetino kaj esperantistino.



Neĝsteletoj

*Unua, dua neĝstelo, tria kuŝas trankvile sur vesto mia.
Ĉiu kviete sonĝas fabletojn pri blankaj baloj, ventaj kantetoj, pri vintraj tagoj, frostaj floretoj, kaj pri infanaj varmaj manetoj.*

Brilaĵo

*Ni elrevos fest-abieton, tian freŝan, aroman, verdantan, tutan inter briletoj starantan, plej ĉarmegan propran fest-arbeton.
Sur fleksebla ĉiu branĉeto ni pendigos miraklan revaron, belmomentojn, ridetojn, sonĝaron – sur fleksebla ĉiu branĉeto.
Kaj sur arbepinto, plej alte, stelo de plenumiĝoj atendas; bondeziroj ni ĉiujn forsendos al la stel' arĝenta, plej alten.*



Halina Kuropatnicka-Salamon kun infanoj

Arbaro de Zamenhof

ZEO 1071 estas parto de la granda verda piceo-arbaro en Taivalkoski, nordorienta Finnlando, oriente de la longitudo 27 kaj sude de la latitudo 66. Kiu unue trovos ĝin sur mapo? Provu! Piceoj ŝajnas kiel abioj, sed ili toleras pli malvarman klimaton.

Tiu ĉi ZEO oni nomas Arbaro de Zamenhof. Sur la piceoj pendas lignaj ŝildoj, per kiuj oni dediĉis ilin al la landoj, de kiuj venis vizitantoj al la ZEO. La kutimo daŭras. Vizitanto el “nova” lando rajtas elekti arbon por sia lando. Vi tie vidas ekzemple Arbon de Kroatio, de Svedio kaj aliajn. Kelkaj arboj portas ŝildon pri iu ideo: paco, egaleco, amikeco, aliaj portas ŝildon pri iu organizo: UEA, EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando). Videblas ankaŭ lignaj statuetoj pri bestoj: sciuro, aglo, urso k. a. Sur la grundo kreskas verda musko kaj nordiaj herboj, floretoj, tufarbustoj: vakcinio, mirtelo. En lignaj nestokestoj somere nestas birdetoj. (En la

jaro 2016 en Finnlando okazis kampanjo por konstrui milionon da nestokestoj por birdoj, ĉar naturaj nestotruoj en arbotrunkoj ne plu facile troveblas pro manko de maljuniĝintaj arboj.) En la tempopaso ili griziĝas, oni ne farbu ilin. Diversaj birdospecoj elektas sian keston i.a. laŭ la grandeco de la enir-truo, ĝi devas esti sufiĉa por la nestonto, sed tro malgranda por rabobirdo aŭ sciuro, kiuj ŝatus vori ovojn/birdidojn.

La ZEO 1071 nomiĝas ankaŭ Fabelarbaro, ĉar tie pendas fabeloj de infanoj, kiuj ricevis premion en Internacia Fabelkonkurso. La konkursoj kaj la ZEO fondis kun sia filino Paŭlina prizorgas s-ino Aini Vääräniemi. Meze de la Fabelarbaro staras kabaneto, benkoj kaj ŝtonoj por subĉiela fajrejo. Tie oni povas simple muziki, kanti, interparoli, refreŝiĝi per trinkaĵoj kaj manĝaĵetoj, aŭskulti fabelojn aŭ historion de la ZEO. Kia ekskurso!

Grupo de geesperantistoj vizitis ZEO 1071 en septembro 2016, dum la ĉiujara kunveno de E-Asocio de Finnlando. Ni estis 26, inter ni brazilano, svedino kaj s-ro Osmo Buller, nun emerito, kiu pasigis sian infan- kaj junul-aĝon en Taivalkoski. La vilaĝo Taivalkoski situas 777 km norde de Helsinko, 210 km oriente de la urbo Oulu. Tie loĝas 1,7 homoj en kvadrata kilometro. La areo estas granda, la loĝantaro en 2015 nombris 4224.

Raita Pyhälä, Finnlando



La ŝildo BONVENON ĉe la enirejo de la arbaro, dediĉita al Zamenhof



Anna Striganova kaj Dimitri Ševĉenko ĉe la Arbo de Rusio



La fondinto de la ZEO, s-ino Aini Vääräniemi



Sep Esperanto-kursoj dum BET-52 en Litovio



La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazis de la 2-a ĝis la 10-a de julio 2016 en la litovia kuracurbo Birštonas, ĉe la rivero Nemano.

Ĉi tiu negranda urbo estis invadita de pli ol tricent verdlingvanoj, venintaj el trideko da landoj; kien ajn oni iris, ĉie eblis renkonti esperantistojn – ĉe la longa kajo de Nemano aŭ sur la monteto apud ĝi, en kafejo, bierejo aŭ vendejo, ĉe mineralakva trinkejo kaj en la parko – dum deko da tagoj Esperanto sonis ĉie en la urbo. Tamen esperantistoj ne estis la sola internacia grupo – samtempe en Birštonas okazis internacia balonkonkurso, kaj oni ĝue spektis aeronavigadon de buntaj balonoj, kaj kelkaj kuraĝuloj eluzis la eblecon leviĝi al la ĉielo kaj ricevi diplomon.

La Tagoj estas nomataj Baltiaj pro la laŭvica okazigo en Estonio, Latvio kaj Litovio. Programe la 52-a BET estis tute internacia, kun forta domino de la kontribuoj el Litovio, Ruslando kaj Pollando. Verŝajne esperantistoj el Latvio kaj Estonio ŝparis siajn fortojn por siaj propraj BET-oj en 2017 kaj 2018.

Oni foje komparas BET al Universala Kongreso, ĉar la Litoviaj BET-oj kultivas la tradiciajn UK-erojn, kiaj Somera Universitato, diversnivela kurso de Esperanto, ekskursoj, artaj aranĝoj k.s. Sed kontraste al UK-oj, kie okazas pagataj lingvokursoj, la tuta diversnivela instruado dum BET estas tute senkosta por la partoprenantoj.

Ĉiutage spertaj instruantoj realigis por ĉiu nivelo po du sesiojn, daŭrantajn sume tri horojn. Stano Marček (Slovakio), Aida Čižikaitė (Litovio), Nina Pietuchowska

(Pollando), Mikaelo Lineckij (Ukrainio) kaj tri ruslandanoj (Irina Gončarova, Svetlana Smetanina kaj Abdurahman Junusov) gvidis diversgaŭlojn al lingva perfektigo sub la kunordigo de Gražina Opulskienė. Stano Marček instruis laŭ sia fama rekta metodo.

Per la prelegaro de profesoro Aloyzas Gudavičius scienculoj konatiĝis kun la litovaj lingvo, kulturo kaj historio. Sian kurson “Esperanto en interkultura komunikado” prezentis profesorino Ilona Koutny el la Poznana Universitato Adam Mickiewicz (Pollando). Profesoro Walter Źelazny el la Bjalistoka Universitato faris ciklon pri bazaj elementoj de judaismo, kiu estas grava por kompreni la iniciatoron de Esperanto.

La klerigan programon kompletigis pluraj apartaj prelegoj pri variaj temoj, iuj rilatis al la fenomeno Esperanto, aliaj al ĝeneralaj temoj, kiel kosmo kaj astronomio, kulturo de Pakistano kaj Nepalo, rilatoj inter homo kaj besto, defendaj konstruaĵoj de la 19-a jarcento. Pri fabeloj en diversaj lingvoj prelegis Anna Striganova. Oni ne nur multe instruis, sed ankaŭ raportis pri modernaj eblecoj lerni ĉe Duolingo, distancaj kaj retaj kursoj, pri loko de Esperanto en socireta epoko. Sed Esperanto utilas ne nur al esperantistoj. Tion trafe pruvis Maria Pokrzywnicka, konigante sperton de la Etnografia muzeo en Toruń (Pollando). Esperanto restas tradici-libra fenomeno, kvankam elektronikaj libroj jam penetris ĝian merkaton, pri kio rakontis Dmitrij Ŝevĉenko. Apartajn prezentojn havis la eldonejo Impeto, la krimromano *La aventuroj de Ŝerloko Holms*, *Historio de la Esperanta Literaturo*. Funkciis riĉa libroservo de LitEA.



La komencantoj kun Stano Marček

Preskaŭ ĉiu esperantista renkontiĝo povas envii la riĉecon de la realigita kultura programo. Jerzy Dobrzyński, profesoro de la Varsovia Muzika Universitato, multe aplaŭdata de danka publiko, pianludis verkojn de Fryderyk Chopin. Bone kongruis al la humoro ankaŭ la famega polonezo *Adiaŭo al patrujo* de Ogiński, ege ŝatata en Ruslando, virtuoze plenumita de la majstro.

Pliparto de la arta programo okazis en la malnova distrejo Kurhaus, tipa por kuracurboj, kie same bone eblas okazigi koncerton aŭ balon. En la urba kulturcentro koncertis por la BET-anoj lokaj folkloraj ensembloj Lendrūnas kaj Raskila. La altnivela plenumo de kantoj, muziko kaj dancoj, interesaj instrumentoj kaj belaj naciaj kostumoj ravis la internacian publikon.

Koncertis ankaŭ JoMo, Sepa kaj Asorti, Ĵomart kaj Nataša kaj kelkaj “gitarantistoj”. Duaktora Teatro Verda Banano kun Saša Pilipović kaj Georgo



La progresantoj kun Nina Petuchowska



La komencantoj kun Aida Čižikaitė

Handzlik prezentis modernan historion La kredito.

Same kiel en UK, ankaŭ en BET estas ekskursita tago, kiam neniu alia programero okazas. La tuttaga ekskurso ebligis ekkoni la plej belajn bienpalojn de la etnografia regiono Sūduva. Krome duontaga ekskurso ŝipe veturigis la partoprenantojn al Kaŭno, kaj pieda ekskurso konigis interesajn de Birštonas. Grupo da fremdeuloj vizitis produktojn de medo “Lietuviškas Midus” en Stakliškės kaj gustumis ĉi tiun tradician litovan drinkaĵon. La modela organizado de Antanas Visockas havis unusolan mankon – li ne sukcesis antaŭmendi pli trafan veteron. Post la unuaj (tro)varmegaj tagoj venis pluveta kaj malvarmeta vetero, eble tipa por la loko, kiun ĉirkaŭiras granda rivero kaj arbaroj, vastiĝantaj ĉiudirekten.

Ne ĉiu UK havas tiom altan “Altan Protektanton” kiel la 52-a BET – la ĉefministro de Litovia Respubliko Algirdas Butkevičius en sia salutmesaĝo akcentis



La komencantoj lernas ankaŭ dum paŭzoj.



i. a., ke la ideo de Zamenhof “restas aktuala ankaŭ en la nuntempa vivo”. Ankaŭ atento de oficialuloj de la urbo estas grava atesto pri serioza rilato al niaj lingvo kaj komunumo. En la solena malfermo parolis la urbestro Nijolė Dirginčienė, kiu bondeziris, ke oni “enhavoriĉe pasigu la tempon, uzu sanigajn servojn kaj distraĵojn de aktiva ripozo”. En la urbestra akcepto la ronon de mastro plenumis la vicurbestro.

La ĉiutaga plenkolora gazeto *Balenido*, redaktata de Stano Marček (entute aperis ok kajeroj kvarpaĝaj, vidu www.esperanto.lt/board/data/BET52/Balenido1reta.pdf – ...2reta.pdf, ...3reta.pdf ktp) informis pri la taga programo, donis detalajn informojn pri personoj kaj aranĝoj, aperigis fotojn kaj raport(et)ojn. La partoprenantoj laŭdis senprecedencan informan agadon por BET en la novaĵretejo *La Balta Ondo*, kie regule aperis abunda materialo.

Por la unua fojo en la moderna historio de BET okazis granda kvizo, kiun lerte gvidis la nesuperebla kvizmajstro Marian Zdankowski el Pollando. Partoprenis deko da konkursemuloj el diversaj landoj, kiuj dum unu horo devis solvi 16 kvizojn po 10 demandoj en ĉiu, do entute ili devis trovi respondojn por 160 demandoj! Ekster la oficiala programo okazis celebrado de la 25-jariĝo de *La Ondo de Esperanto*. En hejmeca etoso de la kafejo *Banginuko vaišės* la eldonanto, redaktoro,

perantoj kaj redakcianoj rememoris la kvaronarcentan vojon de ĉi tiu internacia magazino. Estis farita grava anonco – *La Ondo de Esperanto* ekde 2017 aperos nur elektronike.

Esperantistoj partoprenis en la litova ŝtata festo – Tago de la ŝtato, de kelkaj jaroj festata la 6-an de julio je la 21-a horo, samtempe en diversaj lokoj de la mondo, kie litovoj loĝas. En la parko de Vytautas kolektiĝis urbanoj kaj gastoj de Birŝtonas, por kune kanti la litovan himnon. Estis aranĝita partopreno de esperantistoj kaj internacia grupo kantis la Nacian Glorkanton en Esperanto.

Ĉu ĉio estis tiom perfekta, kiom mi priskribas? Vere, la organiza teamo laboris modele kaj faris sian plejblon, ke la partoprenantoj ĝuu la aranĝon – interesa programo por ĉiuj gustoj estis garantiita. La sola problemo estis tio, ke la kunvenejoj kaj tranoktejoj situis en kelkaj disaj konstruaĵoj. Esperanto-kursoj funkciis en la urba gimnazio, kiu, cetere, ebligis senpagan uzadon de sia komputila klaso kun la reto. Prelegoj okazis en diversaj konstruaĵoj, bonŝance la programo antaŭvidis 15-minutajn paŭzojn, dum kiuj eblis iri de unu loko al la alia. Parto de la BET-anoj loĝis sur la transa bordo de Nemano kaj devis uzi pramon, kiun luis kaj pagis la organizantoj.

Halina Gorecka (LOdE)



Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius

La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



**Kanto akompanas nin ĉie...
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi
helpas vidi kaj krei alimaniere
la mondon, ebligas revii aŭ
transdoni niajn sentojn.**

Gi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiunmaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon

de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj; do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-leciono.

Mi proponas kune kanti la himnon de Bona Espero, kiu estas la Esperanto-bieno Bona Espero. La vortojn kaj muzikon kreis Alejandro Cossavella. La titolo de la kanto estas Bona Espero, kaj vi povas aŭskulti ĝin kaj eĉ admiri belajn fotojn el Bona Espero ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=DtpQPIZsXfK>.

La muziko estas vere simpla.

Bona Espero

*En Bona Espero ni loĝas
pace kaj en harmoni',
tiun trezoron ni havas
kaj emas donaci al vi.*

*Mildaj leviĝas la voĉoj
al ĉielo: blua senfin'.
Ame laboras la manoj.
La tero, nia patrin'.*

*Kantu kun ni dum la tago.
Ludu kun ni je l' vesper'.
Hela la lum' de la amo.
Brilas la lum' de la ver'.*

*Kantu kun ni dum la tago
Ludu kun ni je l' vesper'.
Hela la lum' de la amo.
Brilas la lum' de la ver'.*

*En Bona Espero ni loĝas
pace kaj en harmoni',
tiun trezoron ni havas
kaj emas donaci al vi.*

*Ĉirpas la griloj ekstere,
noktas sur Monto Balen'
Baldaŭ revenos la suno,
hela la lum' de maten'.*

*Kantu kun ni dum la tago.
Ludu kun ni je l' vesper'.
Hela la lum' de la amo.
Brilas la lum' de la ver'.*

*Kantu kun ni de la tago.
Ludu kun ni je l' vesper'.
Hela la lum' de la amo.
Brilas la lum' de la ver'.*

Bona Espero (4 x)



Bona Espero, idealo kaj realo. Riĉe ilustrita libro de Roman Dobrzyński pri la bonfara esperantista institucio Bona Espero, verkita baze de interparoloj kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia. Legu pli: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8069>



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroteleĵ, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_espero@mail.ru



Indas viziti Italion!

Saluton, karaj legantoj!

La ĉi-numeran materialon ni dediĉas al niaj italaj samideanoj, kiuj spertis lastatempe malfacilajn kataklismojn.

Vi certe komprenis, ke temas pri kelkaj teruraj tertremoj, kiuj skuis la landon kaj forprenis vivojn de kelkcentoj da homoj. Nia revuo ne povis esti flanke kaj esprimas profundegajn kondolencojn okaze de mortoj de la loĝantoj kaj multaj detruoj. Ni deziras al niaj italaj amikoj fortojn, reziston kaj ni preĝos, ke la Naturo favoru Italion!

Tamen ni volas konvinke diri, karaj legantoj, ke malgraŭ malfacilaj travivaĵoj indas kaj endas viziti Italion! Ja la lando estas nekredinde belega kaj ĝiaj loĝantoj – tre gastema, bonkora kaj gaja popolo. Ili ĉiam ĝojas renkonti novajn amikojn



Aŭdienco de la kongresanoj ĉe la Papo



kaj zorgi pri ilia bonfarto. Ĉiujare italaj esperantistoj organizas sian nacian kongreson – la Italian Kongreson de Esperanto, kiun ŝatas miloj kaj miloj da samideanoj tra la tuta mondo. Ĝi estas organizata en diversaj lokoj de la lando kaj tiamaniere permesas plene konatiĝi kun la riĉaj historio kaj kulturo de tiu suna lando.

La ĉi-jara, jam la 83-a kongreso, okazis en Frascati – malgranda urbeto, tre proksime de la eterna urbo Romo. Tiu najbareco certe iĝis aldona allogo por la aranĝo, kvankam malfacilas trovi en Italio lokon, kiu ne interesus vizitantojn. Des pli ke suplemente al riĉaj lokaj naturaj kaj kulturaj valoraĵoj la organizantoj, kiel ĉiam, zorgis prepari varian kaj buntan programon. Ĝi povis kontentigi esperantistojn de ĉiuj aĝoj kaj preferoj. La temo de la 83-a Ital Kongreso de Esperanto sonis tre impone – "Instruado de lingvoj en Eŭropaj lernejoj". Kaj pasis la aranĝo sub la aŭspicio de tri komunumoj, de Frascati, Monte Porzio Catone (kiu estas la najbara urbo) kaj Romo mem. Estas bona respekto al nia internacia lingvo, ĉu? Kaj, sendube, plenmerite! Du seriozaj plurtagaj seminarioj sinkigis



La preĝejo San Pietro Apostolo en Frascati

partoprenintojn en la ĉeftemo: "Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj" kaj "Didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de Esperanto". La unuan gvidis Kristin Tytgat – fama aktivulino el Belgio. Kaj la duan – la ĉefredaktoro de edukado.net D-ro Katalin Kováts. Ambaŭ estis brilaj fakuloj pri la ĉeftemo. Kun Kristin la kongresanoj pridiskutis gravajn problemojn en la nuna lingva situacio en Eŭropa Unio. Katalin spertigis dezirantojn ne nur pri diversaj lernmaterialoj, sed pri ebloj engaĝigi novulojn al la monda Esperanto-movado. Ja ĝuste tio ofte mankas en la moderna instruado de nia lingvo.

Kiel tre gravan aranĝon necesas konsideri ankaŭ la tutagan Kolokvon "Esperanto kaj minoritataj lingvoj", kiu estis organizita komence de la kongreso por vasta ekstera publiko en la urbodomo de Frascati. Se vi legos nur la liston de la partoprenintaj profesoroj el diversaj universitatoj tra la mondo – vi facile imagos la imponon de la kunveno!



Villa Tuscolana en Frascati



Amfiteatro en Tusculum apud Frascati

Altnivelaj fakuloj el Italio, Germanio kaj Usono prelegis pri lingvosituacio en diversaj landoj. Kaj dum la posta ronda tablo ĉiuj interesigantoj povis esprimi sian opinion pri la temo.

Krome, kiel kutime, estis prezentita vasta gamo de diverstemaj prelegoj. Ili prezentis ne nur atendatajn temojn, kiel lingvajn spertojn, Esperanto-agadon, kulturajn aferojn k. s. Oni parolis pri bizonoj, zingibro, sorobano kaj aliaj interesaj temoj. Inter la prelegoj necesas menciigi lecionojn pri eŭropaj interkulturaj projektoj, pri kiuj ofte celas rakonti ankaŭ nia rubriko.

Diversnivelaĵoj atendis novajn kaj jam spertajn parolantojn de nia internacia lingvo. Distraj vesperaj programeroj tre surprizis kaj ripozigis ĉiujn partoprenantojn. La kongresanoj ĝuis belegan muzikon (klasikan kaj popolan), ekzotajn dancojn, korusajn kantojn, spektis filmojn kaj teatraĵojn.

La organizantoj diligente zorgis ankaŭ pri la junulara programo. Junaj




Ostia Antica



Papo mem. Ĝuste tiun eblon donacis al la partoprenantoj la organizantoj de la 83-a Itala Kongreso de Esperanto.

Vere, Italio eblas nomi “la vivanta historio” – oni vidas ĝin dum ĉiu paŝo. Do, vizitu la paĝaron <http://kongreso.esperanto.it/83/>. Kaj ni deziru al la suna gastema Italio bonfarton, prosperon, kaj ni danku nian internacian lingvon Esperanto pro la renkontiĝo kun la sorĉa fabelo!

Elena Nadikova
estrarano de ILEI



kongresanoj gaje pasigis la tempon kaj ofte altiris atenton per sia eksploda rido.

Tre abunda estis la ekskursiva programo. Frascati mem estas fama turisma loko – pro siaj historio, beleco, kuirarto. Krome la urbeto estas nun grava kultura centro, en ĝi situas multaj sciencaj esplorcentroj. Ne hazarde ĝuste Frascati estis la unua urbo, kiun ligis kun Romo la fervojo en la 19-a jarcento. La urbo apartenas al la regiono, kiun oni nomas Romaj Kasteloj. Ĝi kuŝas sur montoj kaj montetoj sudoriente de Romo. Iam en antikvaj tempoj ĉi tie situis vilaoj de Cicerono kaj aliaj romaj nobeloj. En la mezepoko en Frascati loĝis la episkopo kaj somere – la papoj mem. Apud la urbeto situas belegaj antikvaj Tusculum, Grottaferrata, Monte Porzio Catone kaj aliaj vidindaĵoj. Kompreneble ili ĉiuj estis vizititaj de la kongresanoj. Krome la partoprenantoj estis en Tivoli, Palestrina, Antica Ostia, Gaeta, Terracina, iom trapasis la vojon de Odiseo (vera fabelo, ĉu?), vizitis la lagon Nemi, Lagon de Albano kaj la maron. Ja Italio donacas ĉiujn eblojn por ripozi kaj turismumi! Tamen la plej vera perlo de la turisma programo sendube estis Romo – la eterna urbo, kien, kiel sciate, gvidas ĉiuj vojoj. Ni ne priskribos ĉi tie ĝiajn arkitekturajn memoraĵojn, antikvajn monumentojn, belegajn palacojn kaj aliajn vidindaĵojn. Ja por tio necesas granda serio da artikoloj. Ni simple diros: vi devas ekvidi tion mem. Ja kiam vi vidas Romon per propraj okuloj, vi komprenas la majestecon de la homo kaj la homa kulturo. Kaj vi povas ricevi unikan ŝancon ĉeesti la aŭdiencon de la Roma

Kristnaska rakonto

1999, el la gazeto *Die Lupe*, la lupeo, de la Svisa Poŝto. Tradukis el la germana Mireille Grosjean.

Iam estis, ĉirkaŭ tri tagojn antaŭ la kristnaskfestoj, la malfrua vespero. Kelkaj viroj venis al la centra placo de la urbeto. Ĉe la preĝejo ili pentris ĉe la muro “For la eksterlandanoj!”, “Svislando apartenu al Svisoj!”. Per ŝtonoj ili frakasis vitrinojn kaj poste forfuĝis.

Fantoma silento.
“Venu! Sufiĉas!” “Ĉu vere vi opinias tiel?? Kion ni faru nun en la Sudo??”
“En la Sudo: tio estas fakte nia hejmloko! Ĉi tie estas daŭre pli malfacile. Ni faru tion, kio staras sur la muro: For la eksterlandanoj!”

Vere dumnokte meze de la urbo moviĝis multo. La pordoj de la vendejoj malfermiĝis kvazaŭ en eksplodo. Unue eliris la kakaopakajoj, la ĉokoladoj kaj bombonoj en siaj kristnaskaj skatoloj. Ili volis iri al Ganao kaj okcidenta Afriko, ĉar tie ili hejmas. Poste sekvis la kafo, grandkvante, irante al Ugando, Kenio kaj Latin-Ameriko, al sia hejmo. Same faris la bananoj kaj ananasoj, plenigis kestojn, kaj same faris ankaŭ la vinberoj kaj fragoj el Sud-Afriko. Preskaŭ ĉiuj kristnaskaj bongustajoj foriris, nuksoj kaj spicoj reiris al Barato. La kristnaska kuko hezitis, videblis larmoj en ĝiaj vinberokuloj, tamen ĝi iris. Kun ĝi iris la marcipano kaj spicokuko. Nun gravas ne la kvanto, nur la origino, la devenlando. Kiam mateno



venis, la plukitaj floroj ankaŭ foriris al Kolombio kaj la peltmanteloj kun oraj kaj juvelaj ornamoj uzis aviadilojn por atingi diversajn mondopartojn. Longaj kolonoj de japanaj aŭtoj, plenplenaj je optikaparatoj kaj elektronikaĵoj, veturis al Oriento. En la ĉielo videblis la kristnaskaj anseroj, flugantaj al Pollando. En trajnoj foriris la fejnaj silkaj ĉemizoj kaj tapiŝoj al foraj aziaj landoj. Kun granda bruo disŝiris sin la valoraj tropikaj lignaĵoj el la fenestrokadroj kaj fuĝis al amazona regiono. Prudente endis paŝi tra la urbo, ĉar oleo, nafto kaj benzino fluis komence ete poste vaste al Proksima Oriento.

Post tri tagoj estis la plago finita. Ĉiuj varoj sukcesis fuĝi. Akurate okaze de la kristnaska festo. Nenio eksterlanda restis en la vendejoj. Restis abioj, nuksoj kaj pomoj. Homoj povis kanti “Stille Nacht”, silenta nokto, fakte kun aparta permeso, ĉar la kanto devenas de Aŭstrio.

Nur unu afero ne taŭgis. Maria, Jozefo kaj la infaneto restis. Tri judoj. Maria diris: “Ni restu; se ni forlasas tiun landon, kiu instruos al ili la vojon reen, reen al saĝeco kaj homamo?”

Luiza Carol

Angĝela el pufmaizo

Iam, en malproksima lando, en eta domo de eta vilaĝo, vivis malgaja, malsana, malriĉa kaj soleca maljunulino. Ŝia edzo forpasis, ŝiajn filojn oni mortigis dum la longa milito en tiu lando, kaj filinon ŝi neniam havis.

Unu vesperon la maljunulino sidis plorante en sia kuirejo, kiu estis samtempe tagĉambro kaj dormoĉarmo, ĉar ŝia tuta dometo havis unu ĉambron. Restis al ŝi nur kelkaj grajnoj de maizo kaj unu kulereto da oleo por prepari sian tagmanĝon. Ŝi ŝmiris la kaserolon per oleo, enmetis la maizograjnojn, kovris la kaserolon per kovrilo kaj hejtigis ĝin. Poste ŝi atendis iomete. “Puf, puf-puf, puf-puf-puf...” ekaŭdiĝis la pufmaizo en la kaserolo. “Puuuf!” – la kovrilo falis sur la plankon kun granda bruo, kaj ero de pufmaizo falis en la plej malproksiman angulon de la ĉambro. La maljunulino kaŭris por preni ĝin... sed... – jen blanka bela junulino kun orkolora hararo saltis el la ero de pufmaizo. “Saluton, Panjo!” ŝi diris. La maljunulino kriis pro ĝojo.

Ekde tiu vespero la du virinoj ekloĝis kune. Angĝela nomiĝis la bela anĝelo (jes, ŝi estis anĝelo, kompreneble). Kaj ŝi tuj komencis paroli al la kaserolo. Fakte ŝi ne parolis, sed kantis al ĝi per mallaŭta murmuranta voĉo:

“Pufmaizo, pufmaiz’,
miraklo de l’ Paradiz’.”

Kaj la kaserolo faris multegan pufmaizon dum Angĝela kantis. Tiom multe ĝi faris, ke la du virinoj manĝis kiom ili bezonis, poste ili donacis pufmaizon al la najbaroj, poste



al la kokinoj kaj al la porkoj de la najbaroj, poste al la paseroj kaj al la sciuroj de la arbaro... La najbaroj komencis viziti la maljunulinon, por ekkoni la bonan Angĝela kaj manĝi pufmaizon. La maljunulino ne plu sentis sin soleca. Ĉiutage Angĝela faris pli kaj pli bongustan pufmaizon, kaj multaj homoj komencis veni en tiun vilaĝon speciale por aĉeti tiun mirindaĵon. La maljunulino ne plu estis malriĉa. Angĝela maturiĝis rapide kaj ŝia kuirarto pliboniĝis. Ŝi komencis fari diversajn tipojn de pufmaizo, uzante bongustajn saŭcojn kun salo aŭ kun mielo. La saŭcoj enhavis vitaminojn, kalcion kaj aliajn sanigajn aferojn, kiuj helpis la malsanajn homojn resaniĝi. La maljunulino ne plu sentis sin malsana. La famo de la pufmaizo kreskis rapide kaj dekoj da kaseroloj laboregis ĉiutage, dum Angĝela dancis kaj kantis laŭ la ritmo de la pufmaizo:

“Pufmaizo, pufmaiz’,
miraklo de l’ Paradiz’.”

Ju pli oni ŝatis la laboron de Angĝela, des pli da potenco ŝi akiris, ĉar anĝeloj estas

des pli potencaj, ju pli oni fidis kaj amas ilin kaj ju pli oni aprezas ilian laboron. Ŝi komencis kuiru ankaŭ bongustajn pudingojn el maizo, en kiujn ŝi enmetis suppon de legomoj, nuksojn kaj spicojn. Ŝi ornamis la pudingojn per pufmaizo kaj la homoj venis por manĝi ilin en la bela restoracio de la vilaĝo. Ŝi ankaŭ faris kukojn el maizo kun mielo kaj kokoslakto, kun sekaj fruktoj kaj migdaloj. La tuta vilaĝo prosperis pro tiu negoco. Angĝela ne laboris pli ol unu horon ĉiutage. Ŝia laboro konsistis el tio, ke ŝi sorĉis ĉiujn kaserolojn samtempe, per dancoj kaj kantoj. Poste la kaseroloj mem laboris. La reston de la tago Angĝela babilis kun la homoj, provante kompreni iliajn problemojn. Ŝi ankaŭ promenis kun la maljunulino, kiu sentis sin pli kaj pli juna.

La tempo pasis, kaj unu tagon jen grandaj kanonoj bruegis apud la vilaĝo. Ĉar ofte okazis militoj en tiu lando, eĉ oni povas diri, ke la homoj vivis sian tutan vivon dum unu sola longa milito kun kelkaj etaj paŭzoj. De kvin jardekoj oni batalis kontraŭ la najbara lando, kaj jam neniu kapablis diri, kiu el la du landoj komencis militi kaj kial. La vilaĝanoj ektimis aŭdante la kanonojn, kaj eniris en la kelojn. Sed Angĝela eliris en la korton kaj komencis danci nudpiede sur la tero, kantante:

“Pufmaizo, pufmaiz’,
miraklo de l’ Paradiz’.”

Kaj kio okazis laŭ via imago? La kanonoj ekpafis: “Bum!! Bum!!” kaj grandaj obusoj falis sur la domojn, sur la ĝardenojn, sur la stratojn. Kaj el ĉiuj obusoj, milionoj da eroj de pufmaizo elsaltis. Kiel neĝeroj ili kovris la tegmentojn, la arbojn, la stratojn. Baldaŭ nigraj aviadiloj malheligis la ĉielon. Oni sendis ilin, por bombardi la kanonojn de la malamikoj. Sed Angĝela daŭrigis siajn dancon kaj kanton. “Bum!! Bum!!” la bomboj eksplodis, kaj milionoj da eroj de pufmaizo blankigis la kanonojn. La vilaĝanoj eliris el la keloj. La infanoj ĝojis kaj ludis kun pufmaizo. La soldatoj de la

fremda lando ekridis. Ankaŭ ili ĝojis. Ili opiniis, ke ili travivas belan sonĝon...

Kaj la vilaĝanoj kaj la soldatoj embarrasiĝis. Ili rigardis unuj la aliajn, ŝatus babili, sed ne havis komunan lingvon. Tiam Angĝela rekomencis kanti. Ŝi portis simplan blankan robon de kotono kaj ŝia orkolora hararo brilis en la milda suno. Ŝi dancis nudpiede sur la tero kaj murmurantis per la sama simpla, ripetata melodio:

“Pufmaizo, pufmaiz’,
miraklo de l’ Paradiz’.”

La paseroj ekdancis kune kun Angĝela, pepante. Fulmo bruligis la serenajn ĉielon, kaj la aero ektremis. Tondro aŭdiĝis, kaj subite ekneĝis per molaj eroj de pufmaizo. La homoj etendis la brakojn, prenis pufmaizon en la manojn kaj manĝis ĝin fascine. Manĝante ili forgesis siajn timojn, siajn kolerajn, siajn suferojn. Manĝante ili ĉiuj sentis sin kiel geamikoj. Manĝante ili sentis pacon, enirantan en iliajn animojn. Kaj subite ili komencis paroli unu al la alia en Esperanto. Ili ne forgesis siajn denaskajn lingvojn. Ili ne forgesis aliajn etnajn lingvojn, kiujn ili foje lernis. Ili iel sentis Esperanton vivanta en siaj mensoj kaj koroj, aldone al siaj denaskaj lingvoj kaj al aliaj lingvoj. Kaj ili ekbabilis amike, spontanee, libere, kvazaŭ ili delonge konis unuj la aliajn. Ili ariĝis en la vilaĝa restoracio kaj festis kune la miraklon de tiu tago. La kaseroloj rapide preparis bonegajn manĝaĵojn.

La pufmaizo falis el la ĉielo dum unu horo. Sur la tutan surfacon de ambaŭ landoj neĝis per pufmaizo en la sama tago dum la sama horo. Post kiam ĉiuj homoj de ambaŭ landoj manĝis la ĉielan pufmaizon, ili sentis sin kvazaŭ denove naskitaj. Ili ĉiuj forgesis venĝon, koleron, malamon, timon. Ili iĝis pli kaj pli honestaj kaj justaj. La kvin jardekoj de milito ekŝajnis malproksimaj, kvazaŭ ili okazis antaŭ longe, dum la praa historio de la homaro. En ambaŭ landoj ĉiu homo ekscipovis Esperanton, aldone al sia propra lingvo aŭ al siaj propraj lingvoj.

Ankaŭ la bestoj de la tero, de la aero kaj de la akvo manĝis la ĉielan pufmaizon kaj fariĝis multe pli mildaj kaj amikemaj. Eĉ la plej sovaĝaj bestoj mildiĝis kaj iĝis pli kaj pli sendanĝeraj.

Kelkaj jaroj pasis trankvile. La homoj kiuj antaŭe laboris en la industrio de armiloj, komencis uzi siajn kapablojn kaj energiojn por prizorgi la homan sanon aŭ plibonigi la homan vivon. La soldatoj revenis hejmen kaj komencis labori. Ili priplantis la teron kaj kreskigis bongustajn legomojn, fruktojn, grenojn, nuksojn kaj fungojn. Ili ne plu sentis la bezonon manĝi viandon. La bestojn, kreskigitajn por viando, oni sendis en la arbaron. La bestkuracistoj zorgis pri tio, ke neniu besto vivanta sur la tero aŭ en la akvo nasku tro multajn idojn. La homoj, kiuj antaŭe okupiĝis pri la industrio de viando, ŝanĝis sian profesion. La plejmultaj trovis laborlokojn en la industrio de manĝeblaj fungoj, kiu evoluis ege rapide. Oni kreis ege multajn novajn tipojn de manĝeblaj fungoj, per kiuj oni faris novajn tipojn de bongustaj kaj sanigaj manĝaĵoj. Oni kreis kolbasojn kaj hamburgerojn el fungoj, kaj tiaj manĝaĵoj fariĝis la plej ŝatataj frandaĵoj de la restoracioj. Oni ege evoluigis ankaŭ la kulturojn de kokosarboj kaj pano-arboj. Kvankam la sciencistoj multege laboris por plibonigi la speciojn de tiuj arboj, mi suspektas ke Anĝela iomete sorĉis ilin, ĉar alie mi ne povas kompreni, kiel la kokosarboj konkurencis la bovinojn pri la kvanto de lakto, kaj kiel la pano-arboj iĝis pli efikaj ol la tritiko. Aliaj grandaj ŝanĝoj okazis en la industrioj de vestaĵoj kaj de ŝuoj. Oni ekuzis nur artefaritajn pelton kaj ledon en tiuj industrioj, kies varoj cetere iĝis pli kaj pli artecaj.

Sed post kelkaj jaroj evidentiĝis, ke ja ekzistas malkontentaj homoj en ambaŭ landoj. Ĉirkaŭ triono el la tuta loĝantaro de ambaŭ landoj malĉeestis, kiam la ĉiela pufmaizo falis sur la teron. Tiam ili ĝuste troviĝis en aliaj landoj de la mondo, ĉu pro tio, ke ili okupiĝis pri negoco de armiloj, ĉu pro tio, ke ili forkuris de la milito kaj

malriĉeco loĝante portempe eksterlande, ĉu pro aliaj kialoj.

Kaj la plejparto de tiuj homoj revenis hejmen post la milito. Kelkaj el ili ja komprenis, kio okazis dum ilia malĉeesto, kaj ĝojis. Sed ne ĉiuj. La riĉaj negocistoj de armiloj kaj posedantoj de armilfabrikoj, kiuj revenis hejmen, perdis multan monon kaj iĝis malkontentaj. Kelkaj viando-manĝemuloj, kiuj revenis hejmen, opiniis, ke ilia lando estas gvidata de frenezuloj. Ili asertis, ke sen viando ili malsatas. Kelkaj ĉasistoj kaj fiŝkaptistoj, kiuj revenis hejmen, malkontentis pro tio, ke oni malpermesis ilian plej ŝatatan “sporton”. Cetere, en la arbarojn kaj la riverojn eniris alilandaj sovaĝaj bestoj, kiuj komencis formanĝi la “mildigitajn” sendefendajn bestojn. La malkontento de la homoj kreskis iom post iom kiel kontaĝa malsano. Anĝela iom post iom perdis la fidon kaj la amon de la homoj kaj de la bestoj. Samtempe ŝia potenco pli kaj pli malpliĝis. Dume la vivstilo de la homoj estis iom post iom revenanta al la antaŭa stato de malboneco, maljusteco kaj malsaneco. Fin-fine la milito rekomenciĝis. Samtempe oni akuzis la bonan Anĝela pri perfido de la patrujo. Oni arestis ŝin kaj portis ŝin en la malliberejon. Nur malmultaj homoj daŭre amis kaj fidis la bonan Anĝela. Tamen ilia fido donis al ŝi sufiĉan forton, por ke ŝi faru sian lastan miraklon: ŝi malaperis sen spuroj. Vane oni serĉis ŝin en la tuta lando.

Vane oni serĉis ŝin ankaŭ en la domo de la maljunulino. La policistoj venis tien kaj kontrolis la tutan ĉambron. Ili vidis nur la maljunulinon, sidantan sur rulseĝo, trankvile trikant. Apud ŝi, blanka kokino kun orkolora kresto estis plukanta maizograjnojn el telero. La kokino aspektis tiom eta kaj taŭzita, ke ŝi similis eron de pufmaizo. La policistoj eliris grumblante, kaj ĝuste tiam komenciĝis pluvo.

Kelkajn tagojn pluvis en ambaŭ landoj. Kiam la pluvo ĉesiĝis, la homoj preskaŭ forgesis pri Anĝela, kvazaŭ la tuta historio pri la pufmaizo estus sonĝo.

Luiza Carol

Legendo pri la natura pejzaĝo

“La fabelputeto de panjo” de Kamila Bártlová-Lampířová, eldonita de la aŭtorino dulingve (ĉeĥe kaj Esperante). Ĉeĥio, 2011, 32 paĝoj, 30 cm. ISBN 9788074150869.



Tiu ĉi libro kunmetas ĉeĥan kaj Esperantan versiojn de la sama fabelo inter siajn kovrilojn. Jen la informo, kiun la aŭtorino aldonas en ambaŭ lingvoj:

“Tiu ĉi fabelon mi rakontis ankaŭ al la lernantetoj de niaj 1A kaj 1B klasoj en majo 2001. Poste ni okazigis patruj-sciencan ekkon-ekskurson el Okříšky al Přibyslavice (2 km longan), dum kiu la infanoj konatiĝis kun lokoj, en kiuj la agado de la fabelo okazis. La celo estis malgranda puteto, sur deklivo en ravino ĉe Přibyslavice, sed la infanoj vidis ankaŭ la sep montetojn por kasteloj de reĝidinoj de la maljuna reĝo. La infanoj de la unuaj klasoj la fabelon ilustris, ili faris multajn desegnaĵojn, per kiuj ili ornamis la koridoron en la Baza Lernejo en Okříšky.”

La rakonto estas legendo rilate la naturan pejzaĝon de tiu regiono. Temas pri reĝo, kiu havis sep filinojn, kaj deziris donaci al ili po unu belan palacon konstruotan sur ĉiuj el la sep montetoj de tiu regiono. Sed la filinoj estis tre kverelemaj kaj la reĝo malkontentegis pri ilia manko de

solidareco. Li petis sorĉiston aliformi la knabinojn en cignojn, sed tiu puno ne iĝis ilin pli saĝaj, kaj ili daŭre kverelis. Tiam la maljuna reĝo tre ĉagreniĝis kaj decidis postuli de la sorĉisto definitive aliformi ilin en diversajn elementojn de la pejzaĝo. Tiel la plej aĝa filino iĝis voĉo de templaj sonoriloj, kiuj alvokas la homojn al konkordo; la dua filino fariĝis apuda ponto kiu ebligas la homojn ambaŭflanke helpi unuj la aliajn; la tria filino iĝis aromo de la arbofloroj en tiu regiono; la kvara filino fariĝis vento, kiu ekblovos por averti pri danĝeroj el ajnaj flankoj; la kvina filino iĝis forta roko, por rememorigi al la homoj, ke ankaŭ ili devas esti persistemaj, rezistemaj kaj fortaj; la sesa filino iĝis trankvila tombejo, por rememorigi al la vivantoj pri ties antaŭuloj (al ŝi la sorĉisto diras: “Pro tio al la ĉi-tiea

popolo la amon al la naskiĝteroj vi poreterne rememorigos!”). La plej juna filino (la sepa) estis permesata elekti sian sorton. Ŝi diris: “Se estas eble, ke iu la gloron de la beleco de tiu ĉi naturo en la mondon laŭ kaj ankaŭ kontraŭ la riverfluo disvastigu, tiam, mi petas, komisiu min per tiu tasko.”

La sorĉisto (kiu fakte estis “la spirito de la lando”) decidis aliformi la plej junan knabinon al sorĉita puto. Li diris:

“Vi fariĝos kanto de profundaĵo de tiu ĉi lando, kaj tial vi estos la fonteto de la puteto! [...] Kaj tiu, kiu ektrinkos vian akvon sorĉan, havos ĉiujn tiujn ecojn, kiujn mi donis per la ensorĉigo al viaj reĝaj fratinoj! Kaj tiu, kiu ektrinkos vian akvon sorĉan, tiu denove eĉ el distancoj plej foraj, eĉ se li ĉe maroj estus, al vi kaj al la tero denove revenos.”

Kortuŝita, la maljuna reĝo rezignis pri sia krono kaj aliformiĝis al alta piceo sur la plej alta roko de la plej alta monteto, por ĉiam rigardi de tie sian amatan landon.


Ĉu vi vizitis iam ajn tiun belan regionon? Se ne, ĉu vi emus viziti ĝin?



Luiza Carol

Eleganta libro pri bonkora fiŝisto

“Bonkora Ŝjaudon” de Mej Jing. Bildfabelo por infanoj. Kolora, kun ilustraĵoj de la aŭtoro. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1984, 65 paĝoj, 21 cm.



Tiu ĉi libro estas eleganta albumo, eldonita per dika papero, kun bonkvalitaj pentraĵoj, faritaj de la aŭtoro mem. La teksto de la rakonto ŝajnas al mi emociiga kaj eduka, ankaŭ kun iom da humoro ĉe la fino. La bonkora Ŝjaudon, kvankam fiŝisto, kapablas kompati kaj helpi grandan fiŝon, kies vivon li savas. Poste li savas la vivojn de du vulturidoj kaj de vulpino. Ĉiuj tiuj bestoj estas dankaj kaj promesas helpi lin, kiam li estos en danĝero..

Kaj jen kio okazas poste:

“La knabo venas en kastelurbon, kie li vidas grupon da soldatoj eskorti belan junulon al eŝafodo. La junulo faris nenian

krimon. Oni kondamnis lin al morto nur pro tio, ke li ne povis plenumi postulon de reĝidino, kiam li petis ŝian manon. La amasoj tre indignas pro tio, sed ne kuraĝas publike esprimi sian proteston. La reĝidino havas magian spegulon, en kiu ŝi povas vidi ĉion eĉ sub la tero aŭ sur la ĉielo. Laŭ ŝia postulo ĉiu ŝia manopetanto devas sin kaŝi dum tri tagoj, por ke ŝi ne povu vidi lin en la magia spegulo.

Se li estos trovita, li estos senkapigita. La junulo, kiun Ŝjaudon vidas, jam estas la deksesa viktimo.

Ŝjaudon flamiĝas de indigno kaj venas al la palaco por peti la manon de la reĝidino.”

La bona Ŝjaudon bazas sian planon sur la helpemo kaj fideleco de la bravaj bestoj, kiujn li estis savinta. Mi ne rakontos al vi kiamaniere

Ŝjaudon sukcesas venki la kruelan reĝidininon. Mi nur diras, ke post la venko de Ŝjaudon en la palaco okazas preparoj por brila geedziĝfestoj.

Jen demando: Kiel vi supozas, ke finiĝas tiu rakonto? Ĉu Ŝjaudon kaj la reĝidino geedziĝas kaj feliĉe kunvivas por ĉiam? Ĉu vi kredas, ke la bonkora Ŝjaudon kaj la malbonkora reĝidino estus taŭga paro, kiu ne konfliktus grave kaj malfeliĉe? Aŭ eble vi supozas, ke Ŝjaudon estas ne nur bonkora, sed ankaŭ sufiĉe saĝa por trovi alian vivovojojn por si?

Legonte aŭ aŭskultonte la fabelon kaj rigardonte la ilustraĵojn, vi malkovros kiel ĝi finiĝas.



Hori Jasuo

Enigmo pri Japanio

Virino surportas tiujn ŝtrumpetojn. Ĉu vi pensas, ke tio estas stranga?

En Japanio tiuj 5-fingraj ŝtrumpetoj tute ne estas strangaj. Kiam estas malvarme, vi uzas gantojn. Gantoj havas kvin fingrojn, do kial ne ŝtrumpetoj havas kvin fingrojn? Aŭ ĉu viaj piedoj ne havas fingrojn?

Kiam vi uzas tiuspecajn ŝtrumpetojn, vi sentas pli da varmo. Kiam viaj piedoj estas varmaj, la sango tie suprenvojaĝas kaj vigligas la korpon. Nun multaj



japanoj uzas tiuspecajn ŝtrumpetojn, kaj ili ŝatas pli belajn. Vidu, sur la ungoj fiŝoj naĝas.

Tiu virino surportis tro malgrandajn ŝuojn kiam ŝi estis juna kaj do la piedoj iom deformiĝis. Por tiuj piedoj, kvin-fingraj ŝtrumpetoj efikas pli bone.




Vivo estas

Vivo estas okazo – spertu ĝin
 Vivo estas belo – admiru ĝin
 Vivo estas revo – faru ĝin realo
 Vivo estas defio – alfrontu ĝin
 Vivo estas tasko – plenumu ĝin
 Vivo estas ludo – ludu ĝin
 Vivo estas valoro – flegu ĝin
 Vivo estas trezoro – gardu ĝin
 Vivo estas amo – ĝuu ĝin
 Vivo estas mistero – perceptu ĝin
 Vivo estas promeso – plenumu ĝin
 Vivo estas malĝojo – venku ĝin
 Vivo estas himno – kantu ĝin
 Vivo estas lukto – akceptu ĝin
 Vivo estas tragedio – batalu kontraŭ ĝi
 Vivo estas aventuro – frontu ĝin
 Vivo estas fortuna – gajnu ĝin
 Vivo estas vivo – defendu ĝin

Tradukis Marija Beloŝević
 El la libro *Patrino Tereza, preĝoj kaj pensoj*.

Nepalo – regno inter Hindio kaj Tibeto

La rubrikon prizorgas:
Stefan MacGill



Nepalo estas lando kun 147 mil kvadrataj metroj, kaj popolo de 28.8 milionoj, el kiuj ĉ. 2 milionoj loĝas en la ĉefurbo Katmanduo, kaj po 1 miliono en Pokara (meze) kaj Biratnagar en la okcidento.

La altegaj montoj troviĝas en la nordokcidento. Tie loĝas la Ŝerpoj, sino-tibeta popolo kun propraj lingvo kaj viv-stilo. Troviĝas en Nepalo multaj tiaj apartaj etnaj grupoj, do ankaŭ multaj lingvoj, eĉ el malsamaj lingvo-familioj.

La ŝerpoj estas fortaj kaj bonege konas la altajn pintojn, kaj vivadon en granda alteco. Novzelandanoj havas apartajn ligojn al Nepalo, multaj vizitas ĝin. Tio okazas, ĉar la unua homo, konkerinta la plej altan pinton en la mondo (Mt. Everest – tibetlingve Chomolungma) estis novzelandano Sir Edmund Hillary. La grimpo okazis en 1954



kaj eblis nur kun la helpo de Ŝerpo Tenzing. Poste en 1961 s-ro Hillary, kun helpo de la 'kivioj' konstruigis lernejon en alta vilaĝo survoje al la pinto, kiu funkcias ĝis la nuna tago. Legu anglalingve pri tio ĉe: <http://www.siredmundhillary.com/projects.htm> kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Himalayan_Trust. Kiu pretos krei analogian tradukitan paĝon en Esperanto? La nuna vikipedia paĝo estas nur anglalingva.

En Nepalo du ĉefaj religioj, hinduismo (ĉ. 90%) kaj budhismo (ĉ. 10%) kune ekzistas pace, eĉ influis unu la alian. Ni vizitis faman hinduisman templon en Pokhara. Apude estas, kiel kutime, kelkaj kromtemploj en la sama tereno. Mi rigardis pli proksime al unu, kaj konstatis, ke ĝi fakte estas budhisma templo, praktike en la ombro de la hinduismo.

La izoleco de la lando kaj la montega kaj ĝangala tereno favoras la protekton de relative raraj bestoj kaj birdoj.



Fotoj: smg

Nepala krucenigmo

Jen krucenigmo pri interesa lando en la koro de Azio. Eltrovu la landon kaj eksciu kelkajn bazajn faktojn pri ĝi kaj ĝiaj religioj.


(R) uzu la radikon (sen finaĵo)

Horizontale →

- Lando montega, senmara, alte en kaj apud la Himalajoj (6).
- La alteco de Katmanduo estas pli ____ mil-metra (2).
- Satelito de la Tero (R 3).
- Sanktejo de hinduismo aŭ budhismo (6).
- Sankta donajo al dio aŭ al la memoro de Budho (5).
- Kurba aŭ rekta dika kudrilo, uzata en ledo-prilaborado (5).
- Por ____ oni kunmetas manojn kaj diras 'Dhanyabad' (5).
- La naŭa monato, mallonge (4).
- Simbolo en budhismo pri la senfineco de la vivoj (4).
- Apudakva kaj enakva reptilio, inter 3- kaj 6-metra, danĝera por homoj kaj aliaj bestoj. Multaj troveblas en ĉi tiu lando. (R 8)


Vertikale ↓

- Mallonga skribo por memori ion (4).
- La plej granda terbesto, facile portas kvar homojn. Trovebla en ĉi tiu lando (8) (3-2-3)
- Novfoja proksimiĝo al altegaj montoj. (3-2-3)
- Endormigan agon por beboj (5).
- Frakcio, parteto. Nur ĉ. dekkvar ____



- de la tuta popolo de la lando loĝas en la ĉefurbo. Do, temas grandparte pri kampara kaj monta loĝantaro (3).
- Oni faras tion por ricevi lakton de bovino, kapro aŭ poefago (R 4)
 - La granda plimulto de la popolo sekvas la hinduan religion. Nur ĉ. ____ elcentoj estas Budhanoj.
 - La kvara monato, mallonge.
 - Sufikso por kontinueco. En budhisma templo oni ĉant__as mantrojn kune (2).
 - Tio kio ne ekzistis en la originala budhismo, sed aldoniĝis diverslande poste. (R 2)
 - En ĉi tiu lando estas praktikata pli ____ unu religio (2).

Solve el la antaŭa numero





Landaj Re prezentantoj – Perantoj de Juna Amiko

Argentino: *info@esperantoargentina.org*. **Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001, Australia; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg, Austria; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgium; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF, Brazil; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, United Kingdom; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia, Bulgaria; *mrvp@interpres.org*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady II, Czech Republic; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico, Chile. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031, China; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 Koebenhavn, Denmark; *arnecasper@dbmail.dk*. **Estonio:** Ahto Siimson, Kastani 12-11, Paikuse, EE-86602 Pärnu maakond, Estonia; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Hämäläinen Sylvania, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, Finland; *sylvia.h@kolumbus.fi*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, France; *zav@esperanto-panorama.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz, Germany; *wolfgang.schwanzner@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germany; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid, Spain. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Spain. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; *hungario@gmail.com*, *www.esperantohea.hu*. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; *simio_2004@yahoo.es*. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík, Iceland; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatajim, Israel; *saviogp@zahav.net.il*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italy; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Japan; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Croatia; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2, Cuba. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas, Lithuania; *irenaa@takas.lt*. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefare 8 A, NO-4340 Bryne, Norge; *akbondhus@jkn.no*. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753, New Zealand; *gddewar@ihug.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan, Pakistan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, Poland; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa, Portugal; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baia Mare, Romania. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad, Russian Federation; *sezonoj@mail.ru*. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; *zciric2@gmail.com*. **Slovakio:** Peter Baláž, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakia; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste, Italy. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg, South Africa. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå, Sweden; *leif.holmlund@telia.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen, Switzerland; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73 Taiwan; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, United States; *eusa@esperanto-usa.org*. **Venezuelo:** Peter Jaimez, Poštkesto 3482, VE-1010 A Caracas, Venezuela. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Netherlands; *uea@uea.org*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al ILEI. oficejo@gmail.com.**

Esperanto en muzikfestivalo

Esperanto aŭdiĝis dum la plej granda muzikfestivalo en la mondo Woodstock en Kostrzyn, Pollando, la 14-16-an de julio 2016 ĉe la pola/germana landlimo, kun kelkcent mil da ĉeestantoj!

Pri enkonduko de Esperanto en tiun precipe junularan festivalon longe batalis Kazimiro Krzyżak, la 88-jara emerita oficiro de mararmeo, iniciatinto de gravaj enparlamentaj decidoj por Esperanto-movado kaj aganto de Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz. Pro lia iniciato sukcesis enskribi de Esperanto kiel Nemateria Kultura Heredaĵo en Pollando sur la Liston de Naciaj Kulturheredaĵoj.

Nia Multkultura Vilaĝo Esperanto situis en la plej prestiĝa zono de la festivala tereno: sur la monteto de Akademio de Belegaj Artoj, kie estis ĉ. 60 institucioj/organizoj el la kampo de edukado, kulturo kaj arto. La “Vilaĝo Esperanto” konsistis el du grandaj kaj kvar malgrandaj tendoj. La “Vilaĝanoj” vivis dum la festivalaj tagoj vere kiel bona familio, ĉar la grupo estis 4-generacia: de 12-ĝis 88-jaraĝa, kaj 3-nacia. 18 personoj faris “Grandan Rondon Familian”: ĉiuj laboris de mateno ĝis nokto, ĉiam pretis informi, inviti, instrui, disdoni la materialojn aŭ regali per varma teo, kiam alvenis plua tago.

Tre riĉa estis nia informa stando: 10-metrojn longa ŝildo informis pri Multkultura Vilaĝo Esperanto. Antaŭ la tendoj staris rulafiŝoj kun eldonaĵoj de Stano Marček, kun ilia ekspozicio apude sur grandaj tabloj. Tre interesis la publikon jam la fakto, ke la lernolibroj estis eldonitaj en kvardeko da lingvoj, inter ili tre ekzotaj...

La dua informa rulafiŝo invitis al la ĵus komenciĝinta kampanjo pri aplikado de Esperanto en telefonoj kaj platkomputiloj Android, kiun preparis antaŭ la festivalo Piet Buijnsters, programisto de IEI en Hago. La 4-lingva informa afiŝo estis la plej ofte fotografita objekto de la trapasantoj. Informado ĉe la informstando okazis plejparte en la pola, sed ankaŭ en la slovaka, germana, itala kaj en la angla. La geedzoj Cecille kaj Duncan Charters el Usono, universitataj profesoroj, decidis alveni kaj labori “por nia afero”.

Ne mezurebla estas graveco de la laboro de Stano Marček, kiu en la lasta tago eĉ perdis la voĉon pro preskaŭ senpaŭze gviditaj Esperanto-kursoj. Dum unu plua tago, kiam nia gastema tendo fariĝis azilo por malsekaj rifuĝintoj de sub la pluvo (ni savis ilin per taso da varma teo/kafo) – Stano ne perdis la ŝancon por vere tuttaga instruado, vespere kun gitaro eĉ ludante Esperantajn kantojn.

Ni dankas al UEA, kiu helpis nin, monsubtenante konstruadon de la tendumejo, kaj al CEM-estraro, kiu akceptis elspezojn de mono por la organizado de Multkultura Vilaĝo Esperanto. Anonimaj subtenoj egalas kelkcent eŭrojn.

Neniam en la historio de Esperanto-movado oni havis la ŝancon por tiom grandskala informado! **Halina Komar**





Woodstock 2016

